

revuo


esperanto

aprilo 1964

57-a jaro

n-ro 701 (4)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo** 61 La nederlanda karaktero kaj la 49-a (Pompilio)
Gravaj decidoj de la nederlanda ministro pri
financoj (Woessink)
- 62 Niaj taskoj sur loka kaj landa niveloj (Czuba)
- 64 La lingva baro kaj internaciaj komunikadoj
- 65 Katedro de Esperanto en La Laguna
Cejlono malakceptas la anglan post 150 jaroj
- 66 William Shakespeare el Stratford (Tonkin)
- 67 Monologo de Hamleto (trad. Newell)
- 68 Shakespeare: sonetoj 71 kaj 106 (trad. Auld)
- 69 Rembrandt
- 72 Novaj libroj
Ricevitaj eldonaĵoj
- 73 Mallongaj novaĵoj
- 74 49-a Universala Kongreso, Hago, 1964
50-a Universala Kongreso, Tokio, 1965
Memoriga kalendaro
- 75 La Juna Vivo
20-a IJK de TEJO, Amsterdam, 1964
- 76 Nekrologo
Oficiala informilo
- 77 Esperanto en radio
- 78 La Internaciaj Konkursoj

kovrilo "Nokta Gvardio", la konata pentraĵo de
Rembrandt (vidu p. 70)

bildoj Kovrilo: Ĝenerala Nederlanda Turistoficejo

67 D. H. Young

69 Stata Muzeo, Amsterdam

71 same

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
aprilo
1964

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo
Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj,
anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-
RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88.
Girkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi
la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a
de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en
2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun
interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Bin-
nenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj estas perme-
sitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj
jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj
en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono
por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas
ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawara-
machi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario
kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, 38 Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalster-
weg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj
aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse,
Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj,
Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario kaj estra-
rano pri informado, Kystvej 10, 2 th., Aaben-
raa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7,
Zürich 6/57, Svislando.

Post kelkaj monatoj centoj da esperantistoj sin direktos al Den Haag por partopreni en la 49-a Universala Kongreso de Esperanto. Jam ĉ. 1800 personoj el 37 landoj respondis pozitive al la invito de la nederlandaj esperantistoj viziti tian ĉarman kaj diversaspekte interesan landon, kia Nederlando estas. La nombro de sinanoncintoj, je tri monatoj antaŭ la limdato por aliĝo, jam superis la finan nombron de partoprenintoj en la 47-a kaj en la 46-a Universalaj Kongresoj — resp. 1550 kaj 1660 aliĝintoj — kaj grandpaŝe alproksimiĝas al la nombro de aliĝintoj de la 45-a Universala Kongreso — 1930 anoj.

La nederlandaj esperantistoj kaj speciale la membroj de la Loka Kongresa Komitato, fakte meritas la ateston de fido, kiun la esperantistoj donis al ili per tiel grandnombra aliĝado. La esperantistoj konscias ke la organizo de la 49-a Universala Kongreso estas en la manoj de personoj, kiuj laŭkaraktere estas organizemaj kaj precizaj en siaj laboroj.

Sed ne kedu ke pro tio la 49-a U.K. fariĝos

nur kiel eble plej perfekta, sed senanima manifestacio. La nederlanda popolo estas humorista, ankaŭ se tio ne tiel rapide evidentiĝas, kaj en siajn verkojn ĝi kapablas enigi tiun senton. Kiu urbo, ekzemple, starigis karikaturan monumenton al sia tipa enloĝanto, kiel faris Rotterdam? En kiu lando oni eternigis monumente bovinon aŭ strathundon, kiel en Nederlando? Ankaŭ en la 49-a Universala Kongreso, mi estas certa, vi trovos tiun nederlandan karakteron, tiun nederlandan animon.

Jam de pluraj monatoj, ni povas fakte diri jam de unu jaro, la Loka Kongresa Komitato estas laboranta por organizi la 49-an Universalan Kongreson. En tiuj ĉi lastaj monatoj ĝi konkretigas la antaŭe fiksitajn planojn. Malantaŭ ĝi kuŝas, feliĉe, multo farita. Antaŭ ĝi troviĝas ankoraŭ multo farenda. Sed la Loka Kongresa Komitato ne timas: ĝi ja konsistas el nederlandanoj, el tiu popolo, kiun la obstakloj incitas al la lukto.

G. G. Pompilio

Gravaj decidoj de la nederlanda ministro pri financoj

Multaj el la membroj de UEA certe ne konstatas, ke ili estas membroj de Asocio rekonita kiel jura persono laŭ la nederlanda juro. Baldaŭ post la translokiĝo de la C.O. de UEA al Rotterdam, ĝi akiris tian pozicion. Tio havas grandan signifon, ĉar per tio ĝi ricevis la samajn rajtojn, kiujn havas ĉiuj nederlandaj juraj personoj (unuiĝoj, institucioj, kooperativoj) kaj tiuj rajtoj identas al la rajtoj de ĉiuj nederlandanoj, kun nura escepto de la rajtoj — kaj devoj — ligitaj nur al la fizikaj personoj.

La fakto ke UEA estas nederlanda jura persono signifas i.a. ke ĝi povas havi proprieton kaj posedi — kaj nun efektive proprietas kaj posedas! — teron kaj domon, povas akiri heredaĵojn de ĉie en la mondo, povas esti partio en proceso, ktp. Rilate al tiaj aferoj ĝi estas egala al ĉiu nederlandano. Mi pri tio speciale atentigas, ĉar mi eksciis, ke en kelkaj aliaj landoj la leĝoj estas tute aliaj.

Ĉu UEA havas ankaŭ devojn? Jes, same kiel la aliaj nederlandaj unuiĝoj. Sed ili estas limigitaj, ĉar UEA ne nur estas nederlanda unuiĝo, ĝi krome estas kultura unuiĝo kaj pro tio ĝuas la ĝeneralajn avantaĝojn, kiujn la nederlandaj kulturaj unuiĝoj havas. Ĝi tial ne bezonas pagi impostojn pri enspezoj aŭ pri jara profito (se ĝi ekzistas) kaj kiam enloĝanto de Nederlando faras donacon al ĝi, li povas profiti per malpli alta imposto je siaj netaj enspezoj.

Nun UEA akiris du pliajn avantaĝojn. Per decido de la Ministro pri Financoj, datita la 27-an de junio 1963, UEA estas rekonita kiel kultura organizaĵo, kiu rajtas importi, sen pago de dogano, filmojn, diapozitivojn, sonbendojn kaj aliajn objektojn, kiuj havas kulturen aŭ sciencon karakteron.

Duan, ankoraŭ pli gravan decidon faris la Ministro pri Financoj la 28-an de januaro 1964. La ministro — post skriba peto de la prezidanto de UEA — decidis ke li, sur bazo de artikolo pri esceptoj en la leĝo pri impostoj pro ricevataj donacoj kaj heredaĵoj, donos al UEA la samajn privilegiojn, kiujn havas nederlandaj kulturaj kaj sciencaj unuiĝoj, kies laboro etendiĝas ekskluzive sur nederlanda teritorio. Tio signifas ke, kiam UEA ricevos donacojn aŭ heredaĵojn de enloĝantoj de Nederlando, ĝi ne devos pagi heredimpostojn, se la sumo estas ne pli ol 5000 gld., kaj nur 10% se la sumo estas pli ol 5000 gld. Tio estas vere granda avantaĝo, ĉar sen tiu privilegio UEA devus pagi proksimume 40%.

Mi ankoraŭfoje atentigas, ke temas ĉi tie pri donacoj kaj heredaĵoj, akiritaj de UEA kaj faritaj de enloĝantoj de Nederlando. Pri donacoj kaj heredaĵoj el eksterlando la nederlandaj leĝoj tute ne postulas impostojn. Ĉu en tiaj kazoj la lando de la donacinto aŭ mortinto ion postulas, dependas de la leĝoj de la koncerna lando.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj.

S-ro Czuba (Čuba) estas ĝenerala sekretario de la Pola Esperanto-Asocio kaj estrarano de UEA pri landaj kaj fakaj asocioj.

Lian artikolon profite legos ne nur ĉiuj oficuloj de landaj asocioj (precipe la pli novaj) sed ankaŭ ĉiuj laborantaj en lokaj aŭ regionaj organizaĵoj.



Zdzisław Czuba

Niaj taskoj sur lokaj

Ofte oni starigas la demandon, kial nia movado, malgraŭ konstanta progreso kaj multaj seriozaj sukcesoj ne atingis staton de vasta oficiala enkonduko de Esperanto en ĉiujn mediojn de la vivo. Oni renkontas de tempo al tempo esperantistojn, kiuj opinias, ke pri la fina venko de Esperanto decidus iuj gravuloj ekz. prezidentoj de la ŝtatoj aŭ ministroj. Iuj eĉ diras, ke la amaso de la esperantistaro ne estas grava, sed nur granduloj. Ne estas io pli malutila por nia movado ol tiaj aŭ similaj asertoj.

En kelkaj ŝtatoj oni serioze traktas la E-movadon kaj ĉu tio dependas de la gravuloj? Ne, tio dependas de la esperantistoj mem. Elbatali tian pozicion, ke la ŝtato vidu movadon, devas la landa movado kaj por tio estas necesa serioza kaj ĉiu-flanka laboro de esperantistoj, komencante de multaj kursoj kaj simpla informado kaj finante je vizitoj ĉe ministroj. Ĉiuj ĉi agoj devas esti kunigitaj. La ministroj neglektas tian movadon, pri kiu oni aŭdaŝ nenion. Oni ne povas miri al diversaj registaroj, ke ili ne estas interesitaj pri la movado, en kiu ili ne vidas, ke io grava okazas.

En plimulte da landoj la movado havas karakteron "kluban". Tio signifas, ke kelkaj aŭ kelkdeko da esperantistoj kolektiĝas de tempo al tempo en kluboj, rondoj, societoj (plej ofte en kafejo), babilas pri diversaj temoj, kelkaj el ili veturas al universala kongreso por renkonti siajn eksterlandajn korespondantojn, poste revenas al sia klubo, de tempo al tempo trovas iujn novajn adeptojn, se scipovas gvidas iujn malgrandajn kursojn, aĉetas aŭ ne iun libron kaj tio estas ĉio. Ofte en tiel nomata "kluba" movado eĉ tio ne okazas. Grava malsano de tia movado estas kreado de multaj malgrandaj societoj, kluboj kaj rondoj en unu urbo kaj ofte ne-amika konkurenco inter ili; krome en la grupaj kunvenoj partoprenas ege malmultaj personoj. Se al la kunveno venas dek kvin personoj estas jam granda sukceso. Ĉu ne okazas tiel en multaj grandaj urboj de Eŭropo?

En tia organiza stato ni perdas fortojn, tempon kaj monon. Ekzisto de multnombraj societoj en unu urbo kaŭzas, ke kelkaj personoj okupiĝas pri la sama afero ekzemple kelkaj prezidantoj, sekretarioj kaj aliaj estraranoj de diversaj societoj okupiĝas pri la laboro tute sama, organizas laboron, kursojn, preparas prelegojn, kolektas kotizojn ktp. Ne unufoje grandega laboro de la gvidantaro

estas perdata, kaj kion oni povas fari per la mizeraĵ monsumoj de malmultaj membro-kotizoj? Se tiun perdatan energion oni uzus por aliaj celoj, ni farus grandan bonon por la movado. Se ni unuigus niajn fortojn kaj en unu urbo ekzistus nur unu societo kun eventualaj fakaj sekcioj, ni ŝparus multajn streĉojn. Mi donu la ekzemplon de Varsovio: En Varsovio (urbo kun pli ol miliona loĝantaro) ekzistas nur unu societo (laŭ la pola strukturo filio de Pola Esperanto-Asocio) kaj ĝi havas ĉ. 500 membrojn. Dank' al tio ĝi povas eldoni proprajn afiŝojn, propran bultenon "Kune", instrumaterialon, organizi publikajn aranĝojn (ekz. ĉiujare solenajn publikajn vesperojn dediĉitajn al la naskiĝo de Zamenhof), organizi librostandojn dum internaciaj kaj enlandaj foiroj, organizi ĉiu-semajne klubajn vesperojn kun programoj, aranĝi ekskursojn, ĉiujare dekelkajn kursojn, pagi por multaj anoncoj en gazetoj, dissendadi al lokaj entreprenoj kaj laborejoj informan materialon ktp ktp. Ĉu ĉio ĉi estus ebla, se en Varsovio ekzistus dek diversaj societoj, pli aŭ malpli aktivaj konkurcaj societoj de po dudek aŭ tridek membroj? Certe ne! Krome — kiu el tiuj societoj reprezentus la esperantistaron ĉe diversaj lokaj instancoj?

Do, ŝajnas al mi unu grava kondiĉo, se ni volas progresigi nian movadon, ke ni devas nepre unuigi niajn fortojn kaj esti pli ekonomiaj en elspezado de energio kaj forto. Tio povas okazi per unuigo de la societoj, kluboj kaj rondoj en la sama urbo en unu societon, kiu povas havi laŭbezzone kvartalajn kaj fakajn rondojn.

La ekzisto de izolaj societoj organizitaj laŭ religio aŭ politiko, ankaŭ malhelpas la unuigon de fortoj. Tiuj rondoj de katolikoj, protestantoj, socialistoj, anarkiistoj aŭ simile povas labori por Esperanto en unu neŭtrala societo kaj povas ja havi proprajn sekciojn aŭ rondojn en la kadro de la tuturba societo.

Alia afero, kiu devas ŝanĝiĝi en nia movado estas la formoj de laboro en la landaj asocioj. Bedaŭrinde en plimulto de landoj la laboro estas limigita al respondado je leteroj, kiuj venas de interesitoj, gvidado de libroservo, organizo de tempo al tempo de iu aranĝo, kaj kolekto de kotizoj. Oni ne povas miri, ke la ŝtataj instancoj neglektas tian asocion, pri kiu neniu aŭdas. Evidente, oficejan laboron oni devas fari, sed nur post aranĝo de ĉefaj aferoj, kiuj havas decidan signifon por la movado. Do, — kiuj aferoj estas tiel gravaj, ke ĉiu

kaj landa niveloj

landa asocio devus okupiĝi pri ili ? — Jen ili — laŭ mia opinio:

1. Planado, iniciato kaj organizo de laboro en lokaj societoj. — Estas ĝuste, ke la landa asocio sugestu formojn kaj metodojn de laboro por la societoj en la tuta lando. Tio povas okazi per dissendado de cirkuleraĵoj, leteroj, organizo de konferencoj de aktivuloj, fakuloj k.s. Resume la estraro de la landa asocio ne povas esti indiferenta al tio, kio okazas en provincaj societoj.

2. Kontaktoj kun la ŝtataj kaj aliaj tutlandaj instancoj. — Oni ne povas atendi ĝis la ŝtataj instancoj mem proponos ion al ni. Ni devas nepre iniciati diversajn agadojn kaj sur tiu kampo havi specialan kuraĝon kaj persiston. Nian specialan atenton ni devas turni al ministerioj de klerigo (aŭ instruado), kulturo, eksterlandaj aferoj, poŝto kaj aliaj gravaj instancoj kiel landa Unesko-komisiono, sindikatoj, kooperativoj kaj diversaj kulturaj asocioj. Tre grava ministerio por ni estas tiu de klerigo, en kiu ekzistas plej ofte apartaj departementoj por instruado, por programoj kaj lernolibroj, klerigo por plenkreskuloj (vesperaj lernejoj), klerigo eksterlerneja ktp. En preskaŭ ĉiu departemento ni havas iujn niajn interesojn.

Rekomendinde estas skribi bone argumentitajn leterojn al supre menciitaj instancoj kun konkretaj proponoj. Poste per diversaj vojoj oni devas aranĝi senperajn kontaktojn kun gravuloj kaj oficistoj en koncernaj instancoj por priparoli ilin. Oni ne devas rezigni ĉe la unua eventuala malsukceso sed trovi pli efikan taktikon. Bonan impreson faras valoraj E-eldonaĵoj ekz. "Dia Komedio", "Faraono", k.s. Oni devas eluzi interesiĝon de propaganda fako de ministerio por eksterlandaj aferoj pri disvastigo de nacia kulturo.

En tiu punkto certe mi ne elĉerpis ĉiujn eblecojn, sed mi menciis nur la plej gravajn.

3. Reago al iniciatoj de UEA kaj samtempa agado en multaj landoj. — La landaj asocioj ofte ne sufiĉe aprezas la valorajn iniciatojn de UEA. Se estas iu instig-letero de UEA, estas necese, ke ĉiu landa asocio reagu kaj helpu en la aktiveco. Ekzemple la aranĝo de Zamenhof-solenaĵoj en la tuta mondo havas iun pli gravan signifon ol aranĝo nur en iuj apartaj landoj; koncernaj agoj sur la kampo de instruado povas pli efiki ol individuaj streĉoj. Komuna agado du- aŭ triobligas efikojn.

4. Organizo de la informa servo. Ĉiu meze edukita persono povas redakti kelkajn komunikojn, kiujn oni povas sendi al la landa gazetaro kaj radiostacioj. Do, tiun laboron povas fari eĉ neĵurnalistoj. Minimume unufoje en monato la landa gazetaro devus ricevi informojn pri la movado. Krom tio la landa asocio devus prepari iujn flugfoliojn, broŝurojn aŭ simile. Ni memoru, ke la informa agado atestas pri nia movado ĉe la socio kaj ankaŭ ĉe ŝtataj instancoj. Do, iom da bruo pri Esperanto estas necesa.

5. Koresponda kurso. Ĉiu landa asocio devas gvidi korespondan kurson. Organizo de tia kurso estas facila. Ĉefa afero estas adapto de iu lernolibro por koresponda kurso. Por tia kurso ni devas iom elspezi. Ĝi estas ankaŭ pro tio grava, ke anoncas sin al tia kurso multaj interesitoj el tiuj lokoj, kie E-movado ne ekzistas. Oni povas nur miri, kial nun ne funkcias tiaj kursoj en multaj landaj asocioj. En Pollando koresponda kurso ekzistas jam 15 jarojn kaj ĉiu-jare donas multaj novajn adeptojn, ekzemple en la jaro 1963 enskribiĝis 350 novaj kursanoj kaj tio donis sufiĉe bonan ankaŭ monan profiton por la Pola Asocio.

6. Organizo de librovendado. Plimulto de landaj asocioj posedas libroservojn. Bedaŭrinde ne ĉiam ili havas novajn eldonaĵojn. Ĝenerale oni povas diri, ke informado pri E-libro kaj ĝia vendado estas malbone organizita kaj pro tio ĝi postulas ŝanĝojn en tia direkto, ke ĉiu esperantisto estu ĉiam informita pri ĉiu novaĵo kaj havu eblecojn vidi librojn antaŭ aĉeto. Laŭ spertoj mi povas konstati, ke vendado per mendoj de libroj, kies enhavo estas ne ĉiam konata, estas malpli efika ol senpera vendado en loka societo aŭ librovendejo. Se ne estas eble organizi en ĉiu societo vendadon de libroj, ni klopodu, ke iu loka librovendejo posedu esperantajn librojn, kio estas samtempe valora por informado.

Mi opinias, ke la supre nomitaj punktoj ampleksas aktivaĵojn realigendajn en la unua vico, kaj poste oni devas plenumi tiujn administrajn laborojn de la landaj asocioj.

Ĉi-tiujn aferojn mi prezentas laŭ multaj spertoj en Pola Asocio kaj observado de laboro de aliaj landaj asocioj.

Ne estas vero, ke nur gravuloj ion grandsignifan povas fari kaj la agado de la amaso ne havas decidan valoron. Ĝuste estas kontraŭe. Bonajn gvidantojn oni povas trovi en amasa movado. Ju pli granda ĝi estas des pli multe da bonaj gvidantoj kaj organizantoj en ĝi troviĝas.

Dum konferencoj kun ŝtataj gravuloj mi aŭdis plurfoje, ke en niaj manoj (de esperantistoj) estas la afero de Esperanto, ĉar ŝtataj instancoj taksas la movadon laŭ la utileco de tiu movado por la ŝtatoj. Do ju pli nia movado estas amasa des pli utila ĝi estas por la ŝtatoj kaj la mondo kaj des pli serioze oni traktas ĝin. La ŝtataj eminentuloj povas subteni nian lingvon, se ili vidos ĝian utilan aspekton. Por fari la movadon amasa devas aktive kaj senlace labori ĉiuj esperantistoj.

Antaŭ nelonge, la Internacia Merkatstuda Federacio en ligo kun la Asocio de Profesiaj Merkatesploristoj en Germanujo, organizis internacian konferencon en Hamburgo pri la temo Esploro de Komunikiloj. Ĉeestis ĝin 463 delegitoj el 12 landoj; ĝi altiris oficialajn parolantojn de Usono, Francujo kaj Nederlando. Unu el ili estis S-ro D-ro Jan van Rees, membro de la merkatesplora departemento de Philips, Nederlando.

"En la speciala kunteksto de mia parolado dum tiu kunveno, mi interesiĝis pri reklamo kiel medio de komunikado", li diris kaj aldonis ke jam antaŭ pli ol dek jaroj oni ĉesis mezuri la rezulton de reklamkampanjo laŭ normoj de el ĝi rezultintaj vendoj. "Tio ne eblas, ĉar ĉiu pripensas antaŭ ol aĉeti daŭrvalorajn varojn. Tiu aĉetprocezo prenas ĉ. du monatojn kaj tial la rezulto de reklamo ne estas tuj mezurebla. Kio tamen estas deduktebla estas la konstato kiel diversaj medioj, inter kiuj reklamo, influas la publikon al aĉeto, kion oni notas en reklamoj, kiajn informojn oni memoras kaj ĝis kiu grado la reklamo influas la sintenon."

Por mondampleksaj entreprenoj la problemoj surprenas internacian aspekton; sur tiu tereno problemoj leviĝas, kaj la lingva problemoj certe ne estas la malplej grava.

Diras D-ro van Rees: "Kia ajn la karaktero de la interkomunikado, ĉu ĝi estas novaĵo, ĉu mendo, ĉu televida dissendo aŭ gazetarartikolo, se oni volas atingi la celon de la mesaĝo, ĝi estu volvita en signifoplenaj terminoj, kies esenco estas ke ĝi estu esprimita tiel ke alia popolo ĝin komprenas, aŭ, kompreneble, ke ĝi estu dirita en klara, nemisinterpretebla maniero. Nur tiam oni rajtas atendi reagojn konformajn al niaj espero kaj atendoj. Tio almenaŭ estas la teorio. Tamen, praktika sperto pruvas ke ĉio ne estas tiel glata kaj senkomplika. Sur internacia tereno, estas konate ke kio estas signifoplena el esplora aŭ reklama vidpunkto en iu difinita lando, komplete perdiĝas en alia.

malsamaj pensokadroj

"Kelkajn komplikaĵojn kiuj tiurilate altrudiĝas ni jam vidas sur nacia nivelo. Oftfoje estas malfacile kompreni kaj interŝanĝi vidpunktojn kun homoj kiujn ni konsideras diferencaj de ni rilate al lerneja edukado, profesio, aĝo, klaso ktp.

"Sur internacia nivelo, tamen, la malfacilaĵoj estas pliigitaj de ofte potenca lingva baro, kaj, eĉ se laŭ ekstera verŝajneco, oni parolas komunan lingvon, multaj miskomprenoj povas rezulti. Diferencaj pensokadroj, ankaŭ malsameco de la signifo de idente skribitaj vortoj estas kelkfoje ŝarĝitaj de lokaj emocioj kaj asociaĵoj.

"Tial, internacia komunikado nur povas funkcii se ni sukcesas transpaŝi du obstaklojn.

La unua estas la lingva baro; la dua konsistas el nia povo kompreni la aliulon aŭ eĉ el nia povo adapti nin al malsama pensmaniero. Tio signifas ke ni devas rezigni pri multaj normalaĵoj kiuj kune formas nian ĉiutagan vivon, ke ni devas reorientiĝi. Tuj kiam ni forlasas nian rutinan, bonkonatan teritorion, komenciĝas la aventuro kun novaj malkovraĵoj."

D-ro van Rees plue rakontas kiom malfacile estis venki tiun baron kaj daŭrigas dirante ion pri tradukoj: "Kiam oni komparas la reklam-agadon en diversaj landoj, oni ektrovas ke sloganoj kaj reklama dirmaniero preskaŭ neniam estas tradukoj de sloganoj sukcesplene uzitaj aliloke". Li aldonis: "Al multaj novvenintoj sur la tereno de internacia komunikado estas multfoje malfacile akceptebla la fakto, ke pensoj, esprimitaj en ilia propra lingvo, aspektas tiom malsamaj en alia lingvo, eĉ kiam ili estas bone tradukitaj. Kelkfoje ili eĉ ŝajnas apenaŭ rekoneblaj. Tio povas supozigi mankon de kono pri la fremda lingvo kaj ankaŭ mankon de kono pri la penskaj esprimmaniero de la alia popolo, kondiĉitaj de lingvo, literaturo, eduka sistemo ktp. "Sed ankaŭ ekzistas dua speco de reklamo kaj propagando, kiu vere efikas sur internacia nivelo. Tio nomiĝas "goodwill": institucia, korporacia aŭ prestiĝa reklamo. Ĝi flugas tra la mondo, aperas en periodaĵoj kun internacia abonantaro kaj oni rajtas esperi ke tiu internacia forumo, ĉu ĝi parolas angle, hispane aŭ esperante, ricevas la saman mesaĝon el tiuj reklamoj. Tio ankaŭ eksplikas kial tiaj reklamoj koncentriĝas sur nomo kaj bildoj, apenaŭ indikas aŭ montras la produkton. Nur kiam la produkto estas la sama ĉie en la mondo, tio estas farebla".

La problemoj de la merkatesplor-analizistoj estas eltrovi ĝis kiu grado la informado, entenita en internacia kaj nacia reklamo, penetras la merkaton. Kaj denove, la lingvo sin altrudas kiel la ĉefa problemoj. Kiel diras D-ro van Rees: "La arto fari demandojn estas jam sufiĉe malfacila en nacia lingvo, sed fari tiujn demandojn en terminoj kiuj transportas la plenan signifon al fremdaj popoloj, grave pligrandigas la malfacilaĵojn".

Eksportnegoco postulas konstantan fortoŝtreĉon. Eble multaj kompanioj estus pli sukcesaj se ili ne timus meti sin antaŭ novaj kondiĉoj kaj postuloj. Ĉi tie internacia interkomunikado estas kapta aventuro. Fakte, internacia interkomunikado estas arto lernebla, sed por fariĝi majstro en ĝi, ia teorio de interkomunikado, aplikita en reklamo kaj publikaj rilatoj, tre efike helpus. Ĉiuj klopodoj celantaj al disvolviĝo de pli sistema scio pri amasa interkomunikado kaj ĝia efektivigo, meritas plenan subtenon kaj apogon".

Eindhoven, marto 1964.

E. L. M. Wensing

Katedro de Esperanto en la Universitato de La Laguna



La 7an de decembro 1963 la Estraro de la ŝtata universitato de La Laguna, Hispanujo, fondis oficiale Katedron de Esperanto en sia Instituto de Lingvoj. En tiu Instituto jam ekzistis katedroj de Angla, Araba, Franca, Germana kaj Itala Lingvoj; do Esperanto estas la sesa samranga.

Ci tiu decido de la Universitato de La Laguna kronis 16-jaran klopodadon, kiu komenciĝis, kiam, dum la lernojaro 1946-1947, je peto de S-ro J. Régulo, la tiama dekanato de la Filologia Fakultato, Prof. D-ro E. Serra, permesis la unuan provon de libera instruado de Esperanto.

Post du kursoj, reakcia rektoro nuligis tiun aranĝon, kaj nur en 1952 estis denove permesite instrui Esperanton sub la egido de la Universitato, kiel liberan lernobjekton kaj sen oficiala agnosko. Poste, en 1955, per dekreto de la tiama rektoro, estis duonoficialigita tiu instruado en iaspeca lektorato: oni oficiale akceptis enskribiĝon de gelernantoj kaj oni povis poste peti ateston pri ĉeesto je tiuj kursoj. Sed pro tio, ke la kursoj funkciis nur laŭ dekreto de la rektoro, ĉio dependis de lia bonvolo; kaj efektive en 1961 li haltigis la funkciadon de la kursoj. Post tio, dum du sinsekvaj lernojaroj kelkaj profesoroj de la Universitato daŭre klopodis restarigi la kursojn, sed sensukcese. Nun, en la fino de sep-

tembro 1963, estis enoficigita nova rektoro, kiu bonvole atentis la motivadon de la pledantoj por Esperanto, ĉefe de Prof. D-ro J. Maynar, kaj ordonis al la kompetenta instanco de la Universitato enketi pri la afero kaj informi la Estraron. Post tiu normala proceduro kaj favora informo, en la dato supre indikita la Estraro kreis la Katedron de Esperanto.

La kreo de Katedro de Esperanto en ŝtata universitato estas unuaranga precedenco en Hispanujo, ĉar por la unua fojo en tiu lando oni donas al la Internacia Lingvo plenan oficialan universitatan agnoskon, en rango tute egala al tiu de aliaj gravaj lingvoj de kulturo.

Tuj post la kreo de la katedro, la Universitato anoncis periodon por enskribiĝo, kaj sin anoncis 48 gelernantoj. La inaŭguro de la nova oficiala kurso de la Lingvo Internacia okazis la 21-an de januaro 1964, en ĉeesto de universitataj aŭtoritatoj, kaj la malferman lecionon faris la jama profesoro de la Universitato kaj nun ankaŭ katedra profesoro de Esperanto S-ro J. Régulo Pérez. La loka gazetaro amplekse kaj simpatie raportis per informaj artikoloj, intervjuo al S-ro Régulo ktp.

Kiel dankon al la universitato, kiu pioniris nian aferon en la supera instruado de Hispanujo, estus tre oportune sendi gratulajn kaj dankajn leterojn en Esperanto al la Rektora Moŝto Prof. D-ro A. González, Universidad de La Laguna, Canarias, Hispanujo.

Cejlono malakceptas la anglan post 150-jara uzado

Post 150-jara uzado, la angla lingvo ne plu havas oficialan akcepton en Cejlono. Je nokto-mezo la 31an de decembro, la granda ŝanĝiĝo komenciĝis. En la plej granda malsanulejo de l'insulo, la kolosa Ĝenerala Hospitalo en Kolombo, eniraj kaj ĉelitaj formularoj ĉesis esti angle skribataj. Hodiaŭ la sinhala estas la sola oficiala lingvo de la lando. Ĉiujn registarajn aferojn oni devas pritrakti per la sinhala, kaj registaraj fakoj estas ordonitaj resendi al la sendintoj ĉiujn registarajn proto-

kolojn, cirkulerojn kaj memorigojn ne verkitajn en la sinhala. Nur en fakoj registritaj kiel teknikaj la angla restos — sed nur ankoraŭ du jarojn, ĉar ĝis tiam la personaro devas el-lerni la oficialan lingvon aŭ eksigi.

La publiko daŭre rajtas skribi al la registaro en la lingvo de ĝi elektita (pluraj milionoj scipovas nur la anglan aŭ tamilan lingvon), sed oni respondos nur sinhale. (Laŭ novaĵa servo de "Observer")

Oni festas ĉi-monate la 400-jaran datrevenon de la naskiĝo de William Shakespeare, verkisto kies influo je moderna okcidenta literaturo etendiĝis trans ĉiuj lingvoj kaj epokoj.

Aprezante la karieron kaj atingojn de Shakespeare 350 jarojn post lia morto, nin frontas tuta maro da problemoj. La laborego kaj dediĉo de amaso da studentoj dum la pasintaj 50 jaroj, kvankam ĝi minacas sufoki la simplan ĝuadon de la dramoj kaj poemoj sub montaron da sekaj paperfolioj, tamen sukcese forigis la mitojn kiuj antaŭe ĉirkaŭis ĉi tiun kariereman provinĉanon el Stratford.

William Shakespeare naskiĝis en la familion de prospera burĝo en la foirurbo Stratford, en mezlanda Anglujo, en 1564. Kontraste al la siatempe populara rakonteto, oni scias multe pli pri lia vivo ol pri tiu de preskaŭ ĉiu lia verkista samtempo. Ĉefe, li evidente ne estis iu simpla napokapa kamparano kiu trovis prosperon spite de cirkonstancoj, gajnis sian unuan pencon tenante ĉevalojn por ĝentlemanoj en Londono aŭ ŝtelante cervojn el la parko de la loka nobelo — aŭ io egale fantazia. Male, li edukiĝis en la loka mezlernejo en epoko kiam tiaj mezlernejoj estis rimarkinde altnivelaj. La salajro de la lernejestro de Stratford, ekzemple, superis tiun de la estro de la kolegio de Eton, tiam, kiel nun, unu el la plej famaj lirdaj edukejoj en la lando. Historiistoj de la regno de Elizabeto I (1558-1603) atribuas grandan parton de la prospero de la epoko al precize ĉi tiu disvastiĝo de klereco — kio ebligis al la reĝino kunigi ĉirkaŭ si mirinde talentan kortegon, kiu montris sian sentemon en sia poezio kaj muziko, kaj sian mondanecon en la mono kiun ili havigis (kelkfoje pirate) al ŝiaj kofroj.

La vivo de poeto dum ĉi tiu epoko ne estis aparte feliĉa. Necesis du karakterizoj: obstino, kaj la kapablo adapti sin al la bezonoj de la ŝtato. Obstino necesis ĉar oni ne povis prosperi sen la patroneco de eminentuloj; adaptemo necesis ĉar sen ĝi oni neeviteble enkarceriĝis de tempo al tempo pro sia amo al eksmodaj principoj — kaj tio estas iom ĝena al literatura kariero. Dum ĉi tiu epoko homoj ne povis vivi per la plumo: kelkaj (Greene, ekzemple) mortis je la klopodo. Shakespeare mem aktoris dum la frua vivo — kaj poemaj korteganoj kutime devis akcepti iun malgravan oficon por havigi al si la vivrimedojn, aŭ ili kontentis je verkado simple kiel flankokupo.

Shakespeare feliĉe troviĝis en precize favoraj cirkonstancoj — malgraŭ ĉio. La subita malprosperiĝo de lia patro (kiu ŝajne dum jaroj neglektis la propran komercadon por sin dediĉi al la aferoj de la urbo — pro iu kialo aŭ alia) malpermesis al li ĉeesti universitaton, sed la posta deviga edziĝo kun virino ok jarojn pli aĝa ol li (ses monatojn poste ŝi naskis filinon, Susanna) puŝis al li la bezonon ne nur subteni sin mem sed ankaŭ subteni familion — al kiu poste aldoniĝis ĝemeloj, Judith kaj Hamnet. Vole-nevole, li do eniris la mondon.

Ni ne scias kiam li fine decidis forlasi Stratford kaj sian familion kaj serĉi prosperon en Londono. La mondo tie pretis por li. Historie, lia relative konservativa fono permesis

al li sincere transpreni la filozofion de la reĝina partio — filozofio sur kiu baziĝis la tuta politiko de Elizabeto kaj la potenco de ŝia dinastio. Herede, Shakespeare estis filo de la etburgaro, kun ties tuta lerto je negocado, entreprenemo kaj sagaco. Teatre, la pionira laboro de Marlowe kaj aliaj jam kunfandis elementojn el la antikvaj "moralecaj" dramoj, kiuj siaflanke evoluis el la ekleziaj kaj gildaj teatraĵoj de la malfrua mezepoko, kun nova koncepto pri karaktero, italdevenaj influoj, kaj novaj elementoj el neteatra literaturo. La roluloj de la Moralecaj dramoj, eĉ se ili posedis individuigitajn nomojn (kio ne oftis), reprezentis alegorie abstraktajn konceptojn aŭ ĝeneraligojn — Ricaĵoj, la Mondo, Homo. Iugrade la Faŭsto aŭ la Reĝo Tamburlaine de Marlowe same retenis ĉi tiun ĝeneralan aplikigon, sed ili fariĝis plenefikaj individuoj: la tragedio de Faŭsto estas je la unua nivelo tragedio de individua homo al kiu la spektanto povas rilati kiel individuo — kaj nur je la dua nivelo alegorio de la homa vivdilemo.

Flankalflanke kun ĉi tiu individuigo de la karakteroj okazis kristaliĝo de la lingvo. Estas iom malfacile vere konscii la fakton ke ankoraŭ en 1580 respondecaj, eĉ gvidaj, beletristoj, ankoraŭ produktis seriozajn poemojn bazitajn sur klasika "kvanta" metriko plene fremda al la etoso de la angla lingvo, kaj ankoraŭ disputis pri silabigo de vortoj. Super ĉio ĉi triumfis la firma, adaptiĝema verso de kvin fortaj batoj:

*Ne ĵuru. Kvankam vin mi ĝoje vidas,
ne ĝojas mi pri l'nuna amkonfirmo.
Ĝi estas tro impulsa, malprudenta,
tro flagra, kvazaŭ fulmo, kiu ĉesas,
antaŭ ol oni povas diri: "Fulmas!"
Plej dolĉa, bonan nokton. Ĉi burĝono
de l'amo, eble per la spir' somera,
fariĝos floro ĉe l'revido plua.* (RkJ)

Esencaj karakterizoj de ĉi tiu versoformo estas, unue, la fluo de la vortoj, ofte de verso al verso, seninterrompe: la jamba takto kvazaŭ eĉas la naturan ritmon de la angla lingvo; due, la relativa libereco de la nombro de nefortaj silaboj — karakterizo plene ellaborita nur pli malfrue en la kariero de Shakespeare; trie la abundo de mallongaj, kutime anglosaksdevenaj vortoj (kontraste al la pli pezaj aŭ silaboplenaj latinaj kaj francaj devenaĵoj kiuj inundis la anglan poezion dum la posta jarcento).

Ĉi-lastata karakterizo prezentas specialajn problemojn por tradukanto en Esperanton. Zamenhof, en iom infera komploto kun la germana traduko, radikale plisimpligis la tekston de "Hamlet", produktante eminente ludeblan sed mizere povrigitan dramon. Prozaĵ tradukoj reprezentas iuspecan abdikon de respondeco pri la tuta afero kaj valoras nur kiel klarigoj de la teksto por fremduloj kun suplementenda kono de la angla. Unuvorte

dirite, la dramoj de Shakespeare devis atendi ĝis la kvindekaj jaroj por la unuaj efikaj tradukoj en Esperanton: la du ĉerpaĵoj de Rossetti en "Angla Antologio", la brila traduko de "Otelo" de la sama tradukinto, kaj la traduko de la "Komedio de Eraroj" de Simeonov kaj Auld sumigas la Esperantajn tradukojn kiuj traktas la originalon juste. La kompatinda Zamenhof, konsidere lian limigitan konon de la angla lingvo kaj la malmultecon de la vortaro je lia dispono, brile laboris — sed neeviteble lia traduko duarangas.

Samon oni neniel povus diri pri la aliaj menciitaj tradukoj. La "Komedio de Eraroj" estas konsiderata inter la malpli ludeblaj kaj plej neperfektaj teatraĵoj de Shakespeare, kaj ĝi malofte prezentigas eĉ anglalingve. Ĝia brila sukceso en Sofio parte ŝuldiĝas al la direktado kaj prezento, sed tio ne estus ebla sen la delikate preciza, kaj ofte aŭdaca, traduko. "Otelo", ĝis nun neniam prezentita, kriptostulas



Monologo de Hamleto

Ho, se ĉi tro makula karn' sin fandus,
Akviĝus, kaj sin solvus en roserojn !
Aŭ se l' Eterna ne barinta estus
Per sia leĝ' la sinmortigon ! Dio !
Kiom enuaj, tedaj kaj sencelaj
Ŝajnas al mi la moroj de ĉi mondo !
Fi ! estas ĝi ĝardeno nesarkita;
Herbaĉoj krudaj, laŭ natur' vulgaraj,
Ĝin plenokupas. Ke al tio ĉi
Ni venis: ke nur du monatojn morta —
Ne, eĉ ne du — ke tia bona Reĝo,
Kiu kompare al la nova estis
Hiperion' ĉe Satirus', kaj amis
Tiom mian patrinon, ke eĉ venton
Ĉielan li ne lasus krude tuŝi
Ŝian vizaĝon — ho, ĉiel' kaj ter' !
Ĉu devas mi memori ? Si sin kroĉis
Al li kvazaŭ la apetito kreskus
Per manĝo. Tamen, malpli al monaton
Poste — mi ne pripensu ĝin ! — Malforto,
«Virino» oni nomu vin ! Nur etan
Monaton poste, antaŭ ol eluzi
La ŝuojn, kiujn portis ŝi paŝante
Funebre post la ĉerk' de mia patro,
Kiel Nioba larme; — ŝi, eĉ ŝi —
Ho, Dio ! eĉ la besto senracia
Pli longe ja funebus, — nun edzin'
De mia onklo, frat' de mia patro;
Sed malpli similanta lin, ol mi
Herkulon. Nur monaton, kaj ankoraŭ
La sal' de malsincera plor' ruĝigis
Okulojn ŝiajn, kiam ŝi renuptis.
Ho, malbenita hasto por sin ŝovi
Urĝe en la incestan liton ! Ĝi
Ne portos, kaj ne povos porti, bonon.
Sed krevu, kor', ĉar mi silenti devas. (I, 2)

prezenton: ĝi estas unu el la maloftaj sukcesoj de Esperanta tradukarto — kaj la sola havebla fonto de tiu speciala kvalito de Shakespeare, kiun disponas la Esperantista leganto.

En "Otelo", pli ol en la peco el "Romeo kaj Julieta" kiun mi ĵus citis, Shakespeare plene eluzis la esprimkapablon de la versoformo kiun li adoptis de siaj antaŭuloj kaj muldis al la propraj bezonoj. "Romeo kaj Julieta" verkigis plurajn jarojn pli frue ol "Otelo". Ĝi reprezentas, kune kun "La Komercisto el Venecio" kaj la pli feliĉaj komedioj la zeniton de la individuigo de la karakteroj. Dum ĉi tiu periodo Shakespeare teatrigis plurajn epizodojn el la tiam tre popularaj historiaj kronikoj (kiujn legis amase la lojale naciistaj mezklasuloj — en epoko antaŭ la evoluo de la romano) kaj verkis siajn neforgeseblajn komediojn, kun ilia aro da komikaj, tristaj, belaj roluloj.

Ĉi tiu feliĉa, gaja Shakespeare de la komedioj estas ĉefe la personeco kiun oni elvokas

Shakespeare kaj liaj rolantoj

nun en ĉi tiu festa jaro. Tio estas supozeble neevitebla: Kiel entute festi turmentatan homon? Ĉi tiu mondo de la komedioj estas regata de virinoj: viroj ofte havas nur subulajn rolojn. En tri komedioj estas historio pri knabino kiu alivestigas sin kiel knabon por esti kun la viro kiun ŝi amas. Ĉi tiu de Shakespeare favorata temo gajnas specialan signifon kiam oni memoras ke en la teatroj de la epoko de Shakespeare, knaboj ludis la virinajn rolojn: aktorinoj ne ekzistis.

La komedioj traktas unu ĉefan temon: la perdo de identeco kaj la rezulta, kutime ridiga, konfuzo. Nur kelkfoje, kiel ĉe tiu alia brila verkisto de komedioj, Molière (ekzemple en la karaktero de Harpagon), la konfuzo montras kortuŝan flankon.

Sed nature la perdo de identeco etendiĝas al la dislokiĝo de la homa situacio en la tragedioj. Hamlet hezitas inter siaj roloj; Macbeth facile ignoras — aŭ suprengrimpas — la hierarkion de la monda ordo; Otelo barakte veneniĝas antaŭ perfido de la naturo; la Reĝo Lear, kvazaŭ en kvara, klimaksa, movimento de simfonio, aldonas denove al la individueco la ĉiuhomecon, kaj — kiel blindulo kiu vidas unuafoje je la momento de morto — mortas mizere sed triumfe, mikrokosmo de la homa dilemo.

SONETO 71

Post mia mort', nur daŭru via plor'
dum sonorilon aŭdas vi atesti
per sombra tono, ke mi iris for
el ĉi fimond', kun fiaj vermoj nesti;

eĉ pli: se vi ĉi versojn legos, pri la
skribinta ilin man' forgesu, ĉar mi
vin amas tiom, ke mi min ekzilas
el via pens', se l' pens' vin igus larmi.

Jes, ja — se miajn versojn vi ekvidos,
kiam kun ter' mi komponiĝis jam,
mencii mian nomon vi evitos;
kunputru mia viv' kaj via am',

aŭ eble l' mond' eksciis pri l' sopiro
kaj mokus vin pro mi, post mia iro.

Kontraste al "Lear", "Otelo" estas ĉambra tragedio: la tuta disvolviĝo de la dramo centriĝas ĉirkaŭ la negra Otelo, lia blonde pura edzino, kaj la diabla Jago, lia kornedo. Feliĉe, la dramo en la traduko de Rossetti parolas por si mem: oni povas tute serene ignori la antaŭparolon de Roy Walker, kritikisto, la longeco de kies biografio kvazaŭ pledas (laŭ la plej ĝena Esperantista maniero) lian nesiegeblan eminentecon. La rasproblemo nek menciigis en "Otelo", nek koncepteblus en la mondo de Shakespeare. Simbolismo jes: rasproblemo, s-ro Walker, ne.

Sed dank' al Dio, s-ro William Shakespeare el Stratford bele postvivis ĉiun senrespondecan kritikiston. La mallumaj, profundaj tragedioj palpe esploras la homan psikon laŭ maniero kiun nur la nuna jarcento kun ties psikologoj plene ekkomprenis (kaj Freud mem verkis plurajn eseojn pri la dramoj de Shakespeare); la apudmagia mondo de la finaj "romancoj" ("La Ventego", "Vintra Rakonto") nur ĵus komencis cedi al la kompreno de ĝiaj studantoj kaj direktantoj; la poezio de la dramoj nur dum la pasintaj

SONETO 106

Kiam en la kronik' de l' tempoŝimo
priskribojn mi pri l' bravaj homoj legas,
kaj tie per malnova, bela rimo
lordojn kaj damojn mortajn bel' laŭdegas,

mi scias per ĉi dolĉaj belresumoj,
per mano, lip', okulo, brovo juna,
ke celis pentri ĉi antikvaj plumoj
belon similan al la via nuna.

Do ili laŭdis ja profetfigure
pri nia temp', vin ili antaŭspertis;
kaj, ĉar rigardis ili nur aŭgure,
vin kanti inde ili tro mallertis:

kaj ni, ĉi nunajn tagojn rigardante,
okule miras, sed nepovas kante.


kvardek jaroj elmontris la subtilecon de strukturo (precipe en la ĉenoj de figuroj kiuj formas poeziajn temfadenojn tra la dramoj); kaj apud ĉio ĉi kuŝas la vasta aro da alimaniere adaptitaj kvinpiedaj versoj — la sonetoj. La vortojn kiujn uzis la mirinda homo el Stratford, kiu gajnis sukceson, mortis prospera, konis dumvive eternon kaj malfeliĉon, ni uzu pri li mem kaj la dramoj kiujn li eltrovis:

*Sed jam ne velkos via plensomero,
nek dekliniĝos de l'beleco nuna;
la Morto vin ne tenos kun fiero,
se vin la vers' eterna gardas juna:
Dum homoj spiroj kaj okuloj vidos,
vivante en vivanta vers' vi sidos.*

(Soneto XVIII)

La aŭtoro de la supra artikolo, Humphrey Tonkin, estas esplorstudento pri angla literaturo en la Universitato Harvard, Usono. La monologo de Hamleto estas ĉerpita, kun afabla permeso de STAFETO, el la aperonta traduko de L. N. M. Newell. La portreton de Hamleto desegnis D. H. Young. Sonetojn 71 kaj 106 speciale tradukis William Auld.

Por plia diskuto pri Shakespeare kaj por perspektivo de la angla literaturo ĝis 1800 ni rekomendas la antaŭparolon de Marjorie Boulton en Angla Antologio, 1000—1800, kiu enhavas ankaŭ tradukojn el Shakespeare.



Eĉ personoj, ie ajn en la mondo, kiuj praktike nenion scias pri tiu malgrando lando ĉe la okcidenta bordo de Eŭropo, kiu nomiĝas Nederlando, nek multon scias pri arto, tamen konas unu nomon ligitan al tiu lando: Rembrandt. Ĝi estas la nomo de artpentristo vivinta en la deksepa jarcento — unu el la plej geniaj el ĉiuj epokoj. Genia, ĉar per sia majstra tekniko, per sia unika apliko de lumo-ombro, per sia spirita grandeco, li sciis profunde sondi la animon de la homoj kaj esprimi ĝin en la portretoj.

Rembrandt Harmensz. van Rijn naskiĝis la 15-an de julio 1606 en Lejden kiel filo de bonstata muelisto. La patro sendis lin al la universitato, sed jam tre frue manifestiĝis lia granda arta talento kaj baldaŭ li fariĝis lernanto ĉe la pentristo *Jacob van Swanenburgh*. Sed la lernanto havis pli da talento ol la mastro kaj jam baldaŭ la juna Rembrandt iris sian propran vojon. Liaj unuaj konataj verkoj datumas de 1626, kiam li do havis nur 20 jarojn. Li multe studis vizaĝesprimojn kaj homajn figurojn. Li komencis bildigi bibliajn scenojn, kaj ties homaj figuroj ofte havas la trajtojn de lia patro aŭ de aliaj proksimuloj liaj. Ankaŭ pluraj memportretoj el tiu tempo sendube estis studobjektoj.

Li jam ne sekvis iun skolon kaj komencis apliki siajn tute apartajn lumo-ombro-efektojn, pro kiuj li mondfamiĝis. En 1631 kreiĝis la konata pentraĵo *Simeono en la templo* — troviĝanta en la muzeo *Mauritshuis* en den

Rembrandt

Haag — en kiu la lumo-ombro efikas vere sorĉa. En tiu sama jaro li forlasis Lejden kaj establiĝis en Amsterdam, kie li fervore dediĉis sin al portretpentrado. Unu jaron poste estiĝis la grava verkaĵo "*La Anatomia leciono de profesoro Tulp*" — same en *Mauritshuis*. Ĝi estas majstroverko, kies figuroj de la profesoro kaj aliaj personoj estis bonegaj portretoj. Sekve, li ricevis multajn portretmendojn. Ja oni vivis en la tiel nomata "Ora Jarcento", la holandaj ŝipoj navigaciis sur la sep maroj kaj revenis el orientaj landoj kun ekzotikaj varoj. La komerco floris, la komercistoj fariĝis ĉiam pli bonstataj kaj la vanteco diktis la

Edziĝo ebligis senzorgan lukson

riĉulojn mendi sian portreton ĉe fama pentristo.

En 1634 Rembrandt edziĝis al *Saskia van Uylenburgh*, filino de riĉa frisa familio kaj parenca al la samnomaj grandaj artkonantoj kaj komercistoj de artaĵoj en Amsterdam. La geedzeco estis tre feliĉa. Saskia estis bela kaj gaja kaj Rembrandt ne laciĝis pentri ŝin en plej belaj vestaĵoj kaj plej diversaj roloj, volvi ŝin en luksajn silkon kaj veluron, ornamo ŝin per juveloj. Tre konata el tiu tempo estas la pentraĵo de Rembrandt kun Saskia sur lia genuo. Oni vidas la paron de la dorsa flanko, sed ili turnas la kapon kaj levas la glason. Sed en la sama periodo li dediĉis sin ankaŭ al bibliaj temoj kaj kreis i.a. *La Kompatema Samaritano*, *La Prediko de Johano la Baptisto*, *Abrahamo kaj la Anĝeloj*, *La Edziĝo de Simŝono*. Por la princo Frederiko Henriko li pentris serion de kvin bibliaj scenoj. Ekde 1637 li komencis pentri ankaŭ pejzaĝojn kaj bestojn. En sia pli frua tempo li faris ankaŭ multajn akvafortojn, kiuj fariĝis ne malpli famaj, sed pro multaj mendoj poste mankis al li la tempo por tio.

En 1641 naskiĝis lia filo Titus kaj tio rompis la sanon de Saskia. Unu jaron poste Rembrandt ricevis la mendon, pentri la civilgardion sub gvido de *Frans Banningh Cocq*. La pentraĵo fariĝis mondfama kiel "*Nachtwacht*" (Noktgvardio) kio fakte estas malĝusta nomo. En tiu ĉi pentraĵo la majstreco de Rembrandt atingis kulminon. La lumo-ombroefektoj regas la tuton. El la duonlumo, ŝajne plena de vivo kaj movo, kelkaj partoj kaj figuroj venas al la klara lumo, aliaj mergiĝas en ombron. Jen kaj jen vidiĝas brilo de armiloj. Emocia estas por ni ĉi tiu vizia bildo, sed neniel ĝi kontentigas la mendintojn. Ili ĉiuj volis vidi sian klaran portreton kaj Rembrandt forte ofendis kelkajn, kies vizaĝoj estis en mallumo, dum iu infaneto troviĝas en plena lumo. Anstataŭ doni al ĝi la celitan honoran lokon en la urbodomo, oni provizore kaŝis la grandformatan verkaĵon en subtegmentejo. Dum Rembrandt kreadis la *Nachtwacht* Saskia fariĝis pli kaj pli malsana kaj ŝi mortis en la sama monato junio en kiu la pentraĵo pretiĝis.

Pro tiuj du faktoj: la morto de Saskia kaj la fiasko de *Nachtwacht*, la jaro 1642 fariĝis katastrofa en la vivo de Rembrandt. Li fariĝis melankolia kaj emis retiriĝi el la socia vivo. Lia reputacio kiel portretpentristo ricevis grandan baton kaj konsiderinde malpliĝis la mendoj. Kiam li ricevis mendojn, li pentris la homojn kiel li vidis ilin kaj ne kiel ili mem volis vidi sin. Plurfoje en tiu tempo li pentris portretojn de personoj proksimaj al li, kies psikon li bone konis kaj en kies mieno li sukcesis respeguligi la animon. Multe pli profundaj fariĝis liaj kreaĵoj. Li dediĉis sin denove al bibliaj temoj, sed nun prefere el la Nova Testamento kaj plurfoje li ripetas temojn kiuj adaptiĝis al lia propra animstato.

Kelkajn jarojn poste eniras lian domon *Hendrickje Stoffels* por prizorgi lian mastru-

madon. Sed iom post iom ŝi partoprenas lian vivon kaj kun granda fideleco kaj sindediĉo ŝi restas zorganta, helpanta kaj subtenanta lin ĝis la malfeliĉa fino.

Rembrandt reprenis en tiu tempo la akvafortadon kaj estiĝis pluraj el liaj plej belaj gravuraĵoj, en kiuj reflektiĝas plej delikate lia propra animstato. Iom post iom ŝanĝiĝas la karaktero de liaj verkoj, sendube en kunligo kun liaj personaj zorgoj. Liaj kreaĵoj fariĝas pli grandiozaj kaj monumentecaj, sed aliflanke ili fariĝas ankaŭ pli tristaj kaj kelkfoje maltrankvilaj. Sed tre produktoplenaj estis tiuj jaroj. La *Beno de Jakobo* montras energian penikuzadon. Largajn movojn havas *La lukto de Jakobo kun la anĝelo* kaj *Mozeo disrompanta la ŝtonajn tabulojn*. Estiĝis tiam ankaŭ *Bat-Ŝeba*, kies modelo estis *Hendrickje*, *Jozefo kulpigata de la edzino de Potifaro* kaj *La Adoro de la reĝoj*. Intertempe li plurfoje pentris portretojn de *Hendrickje* kaj ankaŭ de la filo *Titus*. Tre fama estas la bildo de la juna knabo Titus kun krajono kaj papero antaŭ si kaj profunde pensanta pri sia tasko (troviĝanta nun en la Roterdama muzeo *Boymans-van Beuningen*).

Ankaŭ la akvafortoj montras la efikon de la malluma tempo, kiun la pentristo travivis. Unu el la plej viziaj estas *La tri krucoj* kaj grandioza estas lia "*Ecce Homo*", Kristo montrata al la popolo.

la katastrofo

Intertempe la dramo de lia vivo proksimiĝis al kulmino. Jam en 1653 li komencis prunti grandajn monsumojn kaj lia financa situacio fariĝis ĉiam pli minaca. En 1654 naskiĝis al *Hendrickje* kaj li filino *Cornelia*. Du jarojn poste Rembrandt bankrotis. Oni listigis ĉiujn liajn posedaĵojn kaj komencis aŭkcio vendi ilin. La dokumento pri la inventario estas konservita kaj konigas lian grandan artkolekton kaj, pere de tio, ĵetas lumon sur lian guston kaj personecon. Kiel multe suferis la pentristo pro tiuj ĉi okazaĵoj, tio esprimiĝas en la memportretoj el tiu tempo, el kiuj unu el la plej kortuŝaj estiĝis en 1659. Lia domo estis vendita. Por helpi lin kaj protekti lin kontraŭ kreditoroj, *Hendrickje* fondis kun *Titus* artkomercan entreprenon por kiu laboris Rembrandt kontraŭ kompenso de loĝado kaj prizorgo.

Kvankam la memportretoj montras maljuniĝon kaj fizikan detruigon pro la katastrofo, la arto de Rembrandt nur ankoraŭ profundigis pro la batoj de la sorto. La plej perfektaj kreaĵoj de la majstro estiĝis en la lastaj jaroj de lia vivo. Liaj pentraĵoj elradias kvieton kaj mildecon, la tekniko estas largmova, la kompono simpla kaj grandioza. En la komenco de tiu periodo estiĝis la nefinlaŭdebla majstroverko *De Staalmeesters* (La specimnistoj), kiu troviĝas same kiel *Nachtwacht* — en la Ŝtata Muzeo en Amsterdam. La maltrankvilo de la antaŭa periodo malaperis. Ĝi spiras klarecon, kvieton kaj rezignacion. En la jaroj kiuj sekvis, Rembrandt produktis malpli ol antaŭe, sed ankoraŭ kreskis la grandiozeco kaj kolorvarmo. Kion li kreis en tiuj

jaroj, tio apartenas al la plej sublimaj verkoj de la pentroarto de ĉiuj tempoj. El tiu tempo datumas *Homero*, *David* kaj *Saŭlo* — ambaŭ en la "*Mauritshuis*" — *La Juda Fianĉino* — en Amsterdam — *La Familio*, *La Perdita Filo* kaj diversaj memportretoj troviĝantaj, same kiel multaj aliaj el liaj pentraĵoj, en eksterlandaj muzeoj.

Hendrickje Stoffels mortis en 1663. Nova forta bato estis la perdo de tiu virino, kiu en la plej malfacila tempo de lia vivo helpis kaj subtenis lin plej fidele kaj amoplene, sed la funebro ne esprimiĝas en liaj tiamaj pentraĵoj. En 1668 la filo *Titus* edziĝis, sed mortis en la sama jaro. Forgesita Rembrandt postrestis kun la filino *Cornelia*. Li mortis la 8-an de oktobro 1669 en granda malriĉeco. Lia tombo troviĝas en *Westerkerk* (okcidenta Preĝejo) en Amsterdam.

Eksterordinare multflanka estis Rembrandt en sia arto. Li pentris bibliajn temojn kaj burĝajn scenojn, portretojn kaj portretgrupojn, kiel ankaŭ pejzaĝojn kaj senvivaĵojn.

Centra temo en lia verkaro estas tamen la homo. Anekdotaĵoj kaj ĉiutagaĵojn scenojn li prefere desegnis ol pentris. Kiel dirite, en pluraj periodoj de sia vivo li multe akvafortis kaj ankaŭ en tio li atingis unikan altecon. Lia verkaro ampleksas proksimume 270 akvafortojn kaj pli ol 2000 desegnaĵojn. El la lastaj, multaj estas skizoj por grandaj pentraĵoj aŭ por gravuraĵoj, aliaj montras studojn de detaloj, manoj, piedoj, torso en diversaj pozicioj. Multaj aliaj estas pli detale ellaboritaj, kelkfoje per krajono, kelkfoje per kredo kaj estas memstaraj kreaĵoj.

La nombron de pentraĵoj de Rembrandt oni taksas je ĉ. 700. Kvankam parto troviĝas en

nederlandaj muzeoj, granda nombro troviĝas en eksterlandaj muzeoj ekz. en Berlino, Londono, Novjorko, kiel ankaŭ en privataj kolektoj, precipe en Britujo. Lia stilo estis baroka ĝis ĉ. 1642, do ĝis la mezo de lia kariero. La ekstera aspekto ludis pli gravan rolon. Sed poste li forlasis tion kaj la spirita enhavo, la profunda sento fariĝis esencaj. La detaloj perdiĝas, la konturoj malakriĝas, la animo manifestiĝas. Oni povas nomi lin realisto kaj ankaŭ idealisto. La netaksebla valoro de lia arto troviĝas en ĝia profunda homeco.

Kiel ĉiuj genioj, nur longe post lia morto la mondo ekkomprenis lian grandecon kaj signifon. Pentraĵoj, komplete malatentitaj en lia propra tempo, nun havas netakseblan valoron. Oni ĉiel klopodis retrovi kiom eble plej multajn el liaj kreaĵoj, sed sendube nombro el ili perdiĝis. En 1956, okaze de la 350-a datreveno de lia naskiĝo, la muzeo en Rotterdam aranĝis la plej kompletan Rembrandt-ekspozicion iam okazintan. El ĉiuj mondpartoj muzeoj kaj kolektantoj pruntis siajn posedaĵojn por realigi tiun unikan manifestacion. Neniam en la Nederlanda arthistorio iu ekspozicio altiris tiom da publiko. Monatojn post monatoj en longaj vicoj miloj da personoj vizitis ĝin.

En tiu jaro, okaze de tiu datreveno, la plej granda hodiaŭa verkisto nederlanda, *Simon Vestdijk*, verkis serion de 12 poemoj pri "Rembrandt kaj la anĝeloj", inter kiuj unu temas pri la poraŭkcia listigo de la inventario fare de juĝejaj oficistoj. En ĝi troviĝas la jenaj vortoj: "... Ili kaptos min, ili kalumnios min, ili prisilentos mian nomon, kiu post jarcentoj ankoraŭ estos honorata."

(kompilita el diversaj fontoj)



"La specimenistoj",
tolpentraĵo
191 × 279 cm

Bildo sur p.
69: "La juda
fianĉino".



El Suno
ventumado
de greno

NOVAJ LIBROJ

El ĉina fotografia arto. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 112 p. 26 × 23 cm, bindita. Parte kolorpresita. Prezo: 5,30 gld. (21,2 st).*

"El ĉina fotografia arto", kvankam deklaranta sindonon por fotografia arto, al tiu ĉi vidpunkto alproksimiĝas nur en vere mallarĝa proporcio de la elektita fotomaterialo. Precipe la sekvaj fotografiaĵoj: p. 69, 80, 86, 91, 98, 101, 105, krome kelkaj pejzaĝoj, portas signojn de altaj valorakiroj. Tiuj ĉi bildoj estas ankaŭ jam konataj el aliaj okazoj, publikigoj aŭ internaciaj ekspozicioj. La eldonintenco estas klara: plena eluzo de la funkcio de fotografio, kiu estas la plej kapable elokventa el ĉiuj formoj de informinfluo.

F. Kubica (Jihlava)

Propraj nomoj en la Nova Testamento, de H. G. WANNEMAKERS, S. J. Eld. Internacia Katolika Informejo, Tilburg, 1963. 30 p. 21 × 14 cm. Serio de I.K.I. n-ro 2. Prezo: 1,20 gld.*

Ĉi tiuj listoj de hom- kaj lok-nomoj el la N.T. kun vulgata ekvivalento estos utilegaj por ĉiuj dezirantaj sistemigi la Esperantan lingvo-uzon. La okaza nekonsekvenco kiun oni prave rimarkis ĉe miaj elgrekaj tradukoj, kaj provis forigi per artikolo en *Esperantologio* II, 2, vidiĝas ankaŭ ĉi tie: ekz. *Hermeso*, sed *Herodo*; *Tiberio*, sed *Troaso*; *Likio* k.c., sed *Dalmatujo*, *Samotrakujo*. Interese, ke -tius fariĝas -co: *Ponco*, *Terco* (kp. *Klaŭdo*, *Tibero*).

D. B. Gregor (Northampton)

La vojo al mondpaco, de Gunnar RUGLAND. Eldonejo Nova Mondo, Stockholm, 1963. 40 p. 21 × 14 cm., multobligita.

Resumo: En tiu ĉi prelego el la jaro 1950 la aŭtoro eksplikas per kristanaj terminoj "Universalan Leĝon de la Vivo" kondukanta al paco kaj sano per vegetarismo, sennaciismo, unulingvismo, reformita terkulturo kaj similaj rimedoj. Li proponas starigon de tiucelaj kolonioj.

Gvidilo kaj mapo por vizitantoj al New York, Eld. N.Y. Convention & Visitors Bureau Inc. Pershing Square, 90 East 42nd Street, New York 17. Kolorpresita faldfolio, eldonita okaze de la Monda Foiro. Senpage havebla de la eldonintoj; nepre menciu: "gvidilo en Esperanto".

Orfiŝoj. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 14 koloraj fotopoŝtkartoj en kajero.

La bela Ĝuang-brokato de GI Ĝihi, elĉinigas ZEKUN. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 60 p. 13 × 18 cm. Kolorpresita bildrakonto. Prezo: 0,95 gld. (3,8 st).

La obstino, rakontoj de NAKAZIMA Atusi. El la japana MIYAMOTO Masao. Eld. Librejo Pirato, Osaka, 1963. 95 p. 18 × 13 cm. Prezo: 3,80 gld.

Pri la problemo de Stalin. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 23 p., 18 × 13 cm. Prezo: 0,25 gld.*

Resumo: Tiu ĉi "dua komento pri la malferma letero de la Centra Komitato de KPSU" pesas la meritojn kaj erarojn de Stalin, analizas la koncepton de "opono al personkulto" kaj malakceptas ĝin.

Rekomendo de ISAE pri terminaro de magnetaj transduktoroj (grupo 12). Eld. Terminologia Centro de ISAE, Ing. R. Haferkorn, 824 Berchtesgaden, Am Etzerschlössel 15, Germanujo. 3 p. multobligita.

La lasta altaĵo, romano de Huu MAI. Fremdlingva Eldonejo, Vjetnamio, 1963. 366 p. 19 × 13 cm., kun unu mapo. Pri Djen Bjen Fu.

Dubo kaj kredo, Timo — pro kio? Ĉio kun li, Zorgo kiu liberigas. Eld. Esperanta Misio, Östansjö, Svedujo, 1963. 14 × 10 cm. Po 5000 ekz., senpagaj. Evangelia serio 11-14.

Bulgara-Esperanta vortaro, de A. D. ATANASOV, I. SARAFOV, A. SIMEONOV kaj D. SIMEONOV. Stata eldonejo, Sofio, 1961. 629 p. 20 × 14 cm., tolbindita. 10.000 ekz.

Esperanto-bulgara konversacilibro. Stata Eldonejo, Sofio, 1963. 159 p. 16 × 11 cm., tolbindita. 5.000 ekz.

ricevitaj
eldonaĵoj

esperanto
aprilo
72 1964

Malvero kaj vero pri U.E.A.

Okaze de artikolo "Unu jaro da laboro", publikigita en "Heroldo"

En "Heroldo de Esperanto", n-ro 5, de la 16-a de marto 1964, redaktata de s-ino Ada Fighiera-Sikorska, aperis artikolo subskribita de s-ro G. C. Fighiera sub la titolo "Unu jaro da laboro" en la rubriko "Ni recenzas", pri kiu la redakcio deklaras sin "ne respondeca pri la opinioj esprimitaj en ĝi". Tiu artikolo, kiun la verkinto nomas "recenzo" kaj pri kiu li asertas, ke li "multe hezitis antaŭ ol decidiĝi verki" ĝin, estas kulmino de la misprezentoj kaj malveraĵoj pri Universala Esperanto-Asocio aŭ ĝiaj funkciuloj, publikigitaj en "Heroldo de Esperanto" sub la nova redakcio.

La Estraro de UEA, pritraktinte la aferon en sia kunsido de la 22-a de marto, konstatis ke tiaj misprezentoj grave malutilas al la prestiĝo kaj intereso de la Asocio, kaj tial sentis sin devigita entrepreni la necesajn paŝojn por protekti la Asocion. Intertempe, por ripari almenaŭ parte la malbonon faritan al la Asocio kaj por redukti la damaĝojn kaŭzitajn al ĝi, la Estraro deziras korekti almenaŭ jenajn ĉefajn punktojn.

1. S-ro G. C. Fighiera asertas: "Laŭ mia kompreno, ĉiujare elspeziĝas ankaŭ la kotizo de la Dumvivaj Membroj, kies saldo devus iri al la konto "Kapitalo". Per tiu aserto la verkinto kredigas, ke la kotizoj de DM ne iras al la konto kapitalo, kio ne estas vera, ĉar la menciitaj kotizoj efektive iras al tiu konto, kiel estas klare indikite en la jarlibro 1963, Dua Parto, paĝo 35 sub la rubriko "Asocia Kapitalo", ero C.O. R'dam (Dumvivaj Membroj) — nome, en tiu sama jarlibro, kiun recenzas s-ro Fighiera.

2. S-ro G. C. Fighiera asertas, ke la nunaj kotizoj de UEA estas iom altaj, kio "malhelpas la malsuprajn sociajn tavolojn aliĝi al UEA kaj bremsas la laŭnombran kreskon de nia Asocio". Efektive, se oni komparas la kotizon de 20 gld. por MA — por kiu MA ricevas la revuon "Esperanto" kun entute 224 grandformataj internaj paĝoj kaj 44 eksteraj, sume 268, plus la jarlibro en du partoj kun entute 600—700 paĝoj, plus la diversaj servoj de UEA — kun la abonprezo de 13,50 gld. por 20 numeroj de "Heroldo", tiam estas klare, ke la kotizoj de UEA estas relative malaltaj. La kotizo por AM estas nur 0,50 gld. jare kaj ne estas imageble, ke eĉ plej malriĉa esperantisto povus ĝin konsideri tro alta kontribuo.

3. Skribante pri la revuo "Monda Kulturo", la verkinto diris: "Ŝajnas al mi nejuste ke la neabonantoj pagu per siaj kotizoj la malprofiton kaŭzatan de "Monda Kulturo" ". La financa malprofito de "Monda Kulturo", kiu estis antaŭvidita de la Estraro por la unua periodo, neniam estis pagita el la kotizoj de la membroj, kiuj ne abonas tiun kulturan revuon, sed el la Eldona Fondaĵo (vidu p. 33 de tiu sama jarlibro). Cetere, la Estraro de UEA decidis eldonadi la revuon "Monda Kul-

turo" por kompensi la bedaŭrindan malaperon de la Nica Literatura Revuo, kaj la Komitato de UEA unuanime aprobis tiun decidon faritan en la intereso de la esperantlingva kulturo.

4. S-ro G. C. Fighiera asertas, ke la ero "Salajroj" ne inkluzivas "la kompenso por la ĝenerala sekretario kaj la salajron por lia sekretariino", per kio li kredigas la legantaron, ke la ĝenerala sekretario de UEA ne nur havas ian "kompenso", kiu devus eniri en la eron "salajroj", sed eĉ ke li havas salajratan sekretariinon. La vero, kiu estas tre bone konata al la recenzinto, estas, ke la ĝenerala sekretario ricevas kompenso por kovri la elspezojn ligitajn al lia funkcio kaj ke sekve tiu kompenso ne povas eniri la eron "salajroj", kio ĝi ne estas, sed eniras la eron "estraraj elspezoj". Plue, la vero estas, ke la ĝenerala sekretario ne havas salajratan sekretariinon, sed la sekretariino de CED, kies salajro klare aperas en la spezoj de CED (paĝo 38 de la jarlibro 1963, Dua Parto) helpas lin en sia libera tempo ankaŭ en lia funkcio de ĝenerala sekretario. La verkinto forgesis aldoni, ke, por ŝpari ĝis maksimumo la rimedojn de la Asocio, ĉiuj estraranoj mem pagas siajn elspezojn por partopreni la kongresojn, kio estas verŝajne unika en kazoj de internaciaj organizaĵoj.

5. Ne estas vero, ke post pago de la salajroj kaj aliaj elspezoj "restas preskaŭ nenio por la propagando de Esperanto", kiel asertas s-ro G. C. F. La vero estas, ke la Propaganda Konto estas daŭre uzata por la monda informado, kiu ankaŭ en 1962 estis ampleksa, kiel vidiĝas el ĉapitro 8 de la Estrara Raporto sur paĝoj 67 ĝis 74 de la sama jarlibro. Malgraŭ tiu ampleksa laboro, en la Propaganda Konto en la fina de la jaro troviĝis 8942,43 gld., kio estas klare indikita sur p. 35 de la jarlibro.

6. Skribante pri la proceso kontraŭ s-ro Hans Jakob en Ĝenevo, s-ro G. C. F. asertas, ke "la solaj ĝisnunaj rezultoj estas pluraj vojaĝoj al Ĝenevo kaj elspezo laŭ la bilanco prezentita en Sofio, de 1264 gld. ĝis la fino de 1962". Li plue asertas, ke tiu proceso "estis evitinda kaj evitebla". La vero estas, ke la Estraro de UEA faris ĉion eblan por havigi al UEA sen ekstera interveno la havaĵon de la Asocio, kiu troviĝis — kaj parte ankoraŭ troviĝas — ĉe s-ro Hans Jakob. Nur post kiam ĉiuj klopodoj montriĝis vanaj, la Estraro ne trovis alian eliron ol postuli la havaĵon de la Asocio per plendo al oficiala instanco. La Komitato de UEA, kiu estis informita pri ĉiuj detaloj, aprobis tiun necesan paŝon de la Estraro.

7. S-ro G. C. F. diras: "Oni konas la formalajn motivojn de la proceso: por kunmeti ilin oni devis eltombigi aferojn de antaŭ multaj jaroj. Sed, la vera kaŭzo estas verŝajne malnova persona konflikto". La fakto estas, ke la revizoro de la Asocio malkovris, ke s-ro Hans

daŭrigo
sur p. 75

esperanto
aprilo
1964



49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag, 1—8 Aŭgusto 1964

Sub la Alta Protektado de Sia Moŝto Juliana,
Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

No. 8 Rotterdam, la 29-an de februaro 1964

Loĝiga Servo.

Pro speciala situacio en Den Haag, koncerne loĝadon, ni atentigas ke la Loĝiga Servo akceptos mendojn nur ĝis la 15-a de junio 1964, se la litoj je ĝia dispono ne pli frue elĉerpiĝos.

Mendoj, kiuj atingos la adreson de la Kongreso post la menciita dato, ne povos esti traktitaj kaj la dezirantoj devos mem prizorgi sian loĝadon en Den Haag.

Delftbiua telero.

Estas mendebla ĉe la adreso de la Kongreso belega telero el la famkonata delfta bluo (vidu Duan Bultenon). Pro la alta valoro de la verko

(i.a. la pentraĵoj estas mane faritaj), tre limigita kvanto estas je dispono de la dezirantoj.

La speciala prezo por tiu ĉi telero, valora memorajo pri la 49-a Universala Kongreso de Esperanto, estas nur 25,— ned.gld. (100 steloj).

Cseh-Seminario.

Ankaŭ okaze de la 49-a Universala Kongreso estos la ebleco partopreni la Seminarion por instruistoj laŭ la Cseh-metodo.

Detalaj informoj troviĝas en la Dua Bulteno. Statistiko (ĝis 28-2-1964).

Argentino 3, Aŭstralio 6, Aŭstrujo 16, Belgujo 25, Brazilo 2, Britujo 158, Bulgarujo 310, Centra Afrika Respubliko 1, Ĉeĥoslovakujo 10, Ĉilio 1, Danlando 33, Finnlando 29, Francujo 187, Germanujo 125, Hindujo 1, Hispanujo 12, Hungarujo 83, Indonezio 1, Israelo 2, Italujo 51, Japanujo 6, Jugoslavio 60, Kuvajto 1, Luksemburgo 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 273, Norvegujo 12, Nov-Zelando 4, Pollando 121, Portugalujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 78, Svisujo 19, Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko 12, Venezuelo 2. Entute 1655 el 37 landoj (pasintjare 1591 el 34 landoj).

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario



LA AVIADILA VOJAĜO AL TOKIO

Post niaj publikigoj en la decembra numero 1963 de la revuo "Esperanto" kaj en tiu de februaro 1964, kaj post dissendo de la koncerna cirkulero kun demandaro, jam abunde alvenis en la C.O. definitivaj aliĝoj al la aviadila karavano, kiun organizas UEA, kun la apartenantaj antaŭpagoj de po 500,— gld. Estas jam tute certe, ke tiu vojaĝo realiĝos, kaj ĉiuj, kiuj anoncis sin, povas firme anticipi ĝin.

Intertempe, daŭre alvenadas pliaj aliĝoj al la Tokia Kongreso. Ni tre konsilas al la novaj aliĝantoj, kaj al ĉiuj aliaj interesitoj, tuj anonci sin aŭ peti pliajn informojn de la C.O., ĉar pro tiu ĝisnuna sukceso ni povas atendi, ke ankaŭ dua aviadilo povos esti plenigita. Tio estos ebla nur se ni scios kiel eble plej baldaŭ kiom da pliaj interesitoj ekzistas. Por la dua aviadilo ĉiuj kondiĉoj estos la

samaj kun la sola diferenco, ke la datoj de forveturo kaj reveno estos kelkajn tagojn pli fruaj aŭ malfruaj ol tiuj de la unua aviadilo. Eventualajn ŝanĝojn en la vojaĝplano ni povos konsideri surbaze de la respondoj ricevitaj en la demandaro.

Statistiko ĝis 19-3-'64: Argentino 3, Aŭstralio 9, Aŭstrujo 6, Bahamaj Insuloj 2, Belgujo 6, Brazilo 2, Britujo 23, Bulgarujo 7, Centra Afrika Respubliko 1, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 11, Finnlando 4, Francujo 54, Germanujo 27, Hindujo 1, Hispanujo 3, Hong-Kongo 2, Hungarujo 4, Irlando 1, Israelo 1, Italujo 14, Japanujo 13, Jugoslavio 9, Maroko 2, Monako 2, Nederlando 27, Norvegujo 4, Nov-Zelando 4, Pollando 10, Rumanujo 1, Svedujo 26, Svisujo 3, Unuiĝinta Araba Respubliko 1, Urugvajo 3, Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko 18, Venezuelo 3, Entute 318 el 36 landoj.

memoriga kalendaro

Aprilo

30 Limdato Int. Ekzameno (p. 34)

Majo

9-15 IFEF-Kongreso en Bruselo
15-18 Brita Kongreso en Bridlington
16-18 Germana Kongreso en Soltaŭ
Franca Kongreso en Parizo (p. 52)
Belga Kongreso en Liège
Sveda Kongreso en Örebro
23-24 Int. renkontiĝo naturamikoj,
Waasmunster, Belgujo

28-31 Simila, en Oberstdorf i/Allgau, Germ.
31 Limdato Belartaj Konk. (p. 173, 222)

Junio

26-28 Kanada Kongreso en Ottawa
30 Limdato aliĝo 49-a U.K. Hago

Julio

1 Limdato foto-konkurso (p. 34)
2 Sezono Grésillon komenciĝas (p. 72)
3-5 Usona Kongreso en Nov-Jorko

5-8 Tria Somera Universitato, Gyula, Hung.
5-9 Jugoslavia Kongreso, Rijeka, Kroatio
9-20 Int. Junulara Kunveno, Balaton, Hung.
11-13 Bulgara Kongreso en Pleven
11-14 Gen. Kunveno de INOE, St. Chéron,
16-22 Int. Seminario Bulg. E. J., Primorsko
19-26 Int. Feriaj Kursoj, Helsingør, Danl.
21-24 Hispana Kongreso en Valencia
23-29 IKUE-Kongreso en Valencia
25-31 Kvina Geografia Semajno, Groningen
SAT-Kongreso en Narbonne
25-1/8 KELI-Kongreso, Lunteren, Nederl.
30-1/8 Antaŭkongreso en Bruselo (p. 216)

Aŭgusto

1 UK-kotizoj por Tokio plialtiĝos
1-8 49-a Universala Kongreso, Hago
8-12 Postkongreso en Leeuwarden (p. 216)
9-16 20a IJK de TEJO, Amsterdam (p. 74)
9-17 Int. Ferioj, Krommenie, Ned. (p. 20)
23-29 Eŭropa Feriosemajno apud Lugano

esperanto
aprilo

74 1964

Jakob ne nur sen aprobo, sed eĉ sen ia ajn scio de la Estraro vendis en majo 1959 valorajn akciojn de la Asocio. Tiu malkovro de la revizoro kaj ne ia elpensita "malnova persona konflikto" decidigis la Estraron fari pliajn esplorojn rilate la havaĵon de UEA en Genevo.

8. S-ro G. C. F. igas la legantojn, supozi, ke UEA ne subvenciis la Karavanon de Amikeco, nek TEJO-on, nek helpis per abonoj la esperantistojn en "netranspagipovaj landoj". La vero estas, ke UEA pagis al la Karavano de Amikeco subvencion de 1500 gld., daŭre subvenciis kaj helpis al TEJO kaj pere de la Fondaĵo Prof. Canuto sukcesis membrigi al UEA kelkajn centojn da esperantistoj el tiuj landoj.

9. Skribante pri la organiza sistemo de la Universalaj Kongresoj, s-ro G. C. F. asertas: "Post trijara observado de la nova sistemo mi konfesas ke ĝi ŝajnas al mi en kelkaj rilatoj malpli taŭga ol la antaŭa kaj ke ĝi entenas gravajn kontraŭdirojn principajn kaj organizajn erarojn kaj danĝerajn tendencojn". La fakto estas, ke ne "post trijara observado", sed ek de la akcepto de la nova kongresa regularo en 1961 s-ro G. C. F. en artikoloj kaj alimaniere klopodis senkreditigi la novan organizon sistemon misprezentante al la neinformita legantaro ĝiajn unuopajn principojn. Ekzemple, en Heroldo n-ro 11 de la 16-a de julio 1962 s-ro G. C. F., i.a., faris la strangan deklaron, ke la neamasa aliĝado al la kongreso en Kopenhago estis evidente elmonro de la malkonfido de la esperantistoj al la novaj organizaj principoj. Tamen, okaze de la pli ol amasa aliĝado al la Kongreso en Sofio kaj la ĝisnuna granda aliĝado al la Kongreso en Hago li ne diras, ke tiu amasa aliĝado estas evidenta elmonro de la konfido de la esperantistoj al la novaj organizaj principoj.

10. S-ro G. C. F. asertas, ke "la financoj konstituas malfortan punkton en la vivo de nia Asocio" kaj, aliloke, "ni ne devus paroli pri "nekontentiga progresado", sed eventuale pri stagnado". La vero estas, ke en 1952 la asocia kapitalo estis entute 2000 pundoj (aŭ proksimume 20.000 gld.), dum en 1962 ĝi kreskis al 177.000 gld., malgraŭ la rimarkinda ampleksigo

de la laboro, inkluzive informadon, kio evidente postulis ankaŭ minimumajn financajn rimedojn. La vero plue estas, ke en 1952 la nombro de la membroj estis entute 16.243, dum en 1962 ĝi altiĝis al 32.475. Ĉu tion oni povas nomi stagno? Plia konsiderinda progreso estas atingita en 1963. Ne temas, do, pri stagno sed pri progresado, kiu tamen ne estas kontentiga. Parto de la kaŭzoj de tiu nekontentiga progresado estis prezentita en analiza artikolo de la ĝenerala sekretario publikigita en la januara numero de "Esperanto". Al ili sendube devos aldoni la venenado de la atmosfero per tiaspecaj artikoloj de "Heroldo".

11. S-ro G. C. F. trovas kiel kaŭzojn de sia konceptado de "stagno": "malebligo per malveraj asertoj de elekto de meritplena esperantisto, prezidanto de landa asocio, kiel komitatano, transformo de privataj kvereloj en tutmondajn konfliktojn, klopodo malhelpi la aperon de Esperanto-libro, premoj por ke sukcese laborantaj esperantistoj forlasu sian oficon ktp". La Estraro deklaras, ke laŭ ĝia scio neniam oni malebligis "per malveraj asertoj" la elekton de kiu ajn meritplena aŭ nemeritplena esperantisto kiel komitatano de UEA. Sekve, la koncerna aserto de s-ro G. C. F. estas malvera. La cetera parto evidente celas krei plian konfuzon kaj senkreditigi la Estraron respektive ĝiajn membrojn per insidaj aludoj al iuj kvazaŭe ekzistantaj faktoj, en la realo ne okazintaj.

La nuna Estraro estis elektita en Kopenhago en 1962 en atmosfero vere kortuŝa, kiam la tuta Komitato unuanime kaj sen unusola sindeteno akceptis rezolucion, per kiu ĝi forte kondamnis cirkulerojn enhavantajn "krom maljustaj atakoj eĉ ofendajn kaj insultajn esprimojn kontraŭ elstaraj personoj en la movado kaj precipe kontraŭ la ĝenerala sekretario". Ĝi insistis, "ke tia malutila praktiko por ĉiam malaperu el la movado kaj ke plena toleremo estu respektata en ĉiuj rilatoj de la diversaj instancoj de la Esperanto-movado". La Estraro de UEA kun profunda bedaŭro konstatas, ke "Heroldo" malobservas tiun rezolucion, kio fine devigis la Estraron reagi.

La Estraro: Andreo Albault, Zdzisław Czuba, H. W. Holmes, Ivo Lapenna, E. L. M. Wensing, E. J. Woessink, Sven Ziegler.

**vero kaj
malvero
pri UEA**

KOREKTO DE LA ENHAVTABELO

Pro la lastmomenta enpresado de la supra artikolo, la rubriko de Mallongaj Novaĵoj estas prokrastita ĝis majo. Ni pardonpetas al la legantoj de "La Juna Vivo", kiu pro la sama kaŭzo devas aperi sur aparta folio.

**esperanto
aprilo
1964**

Je la 23-a de januaro mortis en Menton la franca Esperantisto T. J. Guéritte, prezidinto de la Brita Societo de Inĝenieroj kaj de la Franca Komerca Ĉambro en Londono, kiu sub lia prezido eldonis siajn dokumentojn ankaŭ esperantlingve. Li estis honora membro de UEA kaj ĝia patrono dum 20 jaroj.

oficiala
informilo
n-ro 367
1 mar. 1964

DELEGITOJ

Vidu la aperontan Jarlibron 1964/I.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Fraser, S-ro Tom, Kirkcaldy, Skotlando
Larsen, S-ro J., Rotorua, Nov-Zelando
Richardson, S-ino M., Upper Hutt, Nov-Zelando
Swift, Leŭt. F. F., Waiouru, Nov-Zelando
Wood, S-ro F. E., Auckland, S.W. 2,
Zepeda, F-ino A., Meksikurbo, Meksiko

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

114. Mallett, F-ino E. E., Edgware, Britujo;
115. Middlemast, S-ro Arthur H., Bourne-mouth;
116. Phelan, S-ro H. K., Old Bexley, Britujo;
117. Prince, S-ro A., Letchworth, Britujo;
118. Saunders, S-ino A. J., Ventnor, I.o.W.;
119. Sinclair, F-ino P. C., Methil, Britujo;
120. Sly, S-ro K. A., Letchworth, Britujo;
121. Williams, S-ro Norman, Manchester, Brit.;
122. Withey, S-ro D. H., Liverpool, Britujo;
123. Blume-Jensen, S-ro A., Glostrup, Danujo;
124. Frey, S-ro Hans H., Frederikshavn;
125. Hou, S-ro C. H., Hillerød, Danujo;
126. Jahn, S-ro C. J., København-Brønshøj;
127. Jørgensen, S-ino A., Vejle, Danujo;
128. Lange, S-ro O. C., Hvidovre, Danujo;
129. Rude, S-ro Victor, Stenlille, Danujo;
130. Ziegler, S-ro S., Aabenraa, Danujo;
131. Ihander, F-ino O., Pietarsaari, Finn.;
132. Narvala, S-ro N. G., Käpylä, Finnlando;
133. Pyykönen, S-ro Juho, Lauritsala, Finn.;
134. Vilkki, S-ro Joel, Somero, Finnlando;
135. Vuolo, S-ro L., Suomusjärvi, Finnlando;
136. Vuori, S-ro A., Särkisalo, Finnlando;
137. Jolliet, S-ro L., Wiesbaden, Germanujo;
138. Olivan, S-ro S., Vigo, Hispanujo;
139. Boscarino, S-ro G. S., Ragusa, Italujo;
140. Lacalendola, Prof. A., Bari, Italujo;
141. Sgroi, S-ro R., Catania, Italujo;
142. Clark, S-ro H. E., Toronto, Ont., Kanado;
143. Maier, S-ino A. L., Galiano I., Kanado;
144. Tuch, S-ino R., Toronto 2 B, Kanado;
145. Romano-Joly, S-ro M., Dolisie, Kongio;
146. Douma, F-ino J. S., Deventer, Nederlando;
147. Hoekma, S-ro A. G., Den Haag, Nederlando;
148. Luyke, S-ro H. C., Katwijk, Nederlando;
149. Oliveyra, S-ro A. d', Amsterdam-Z.;
150. Ponti, S-ro D., Den Haag, Nederlando;
151. Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Nov-Zel.;
152. Hall, S-ro W. J., Palmerston North, N.Z.;
153. Wiltshire, S-ro Arthur G., Auckland W. 3;
154. Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo;
155. Serra, D-ro Pedro, Aveiro, Portugalujo;
156. Blid, S-ro Algot, Nynäshamn, Svedujo;

Mortis Anatolo Koh, la patriarko de sovetaĵ Esperantistoj, dumviva Delegito de UEA. Koh naskiĝis samtempe kun Esperanto — la 15-an de julio 1887, kaj edukis milojn da junaj Esperantistoj. Li faris sennombrajn prelegojn kaj verkis du grandajn vortarojn: la rusa-ukraina-Esperantan kaj la Esperanta-rusa-ukrainan.

157. Bouvier, S-ro P., Genève, Svislando;
158. Grutter, S-ino L., Samedan, Svislando;
159. Jayet, F-ino E., Paquis, Morges, Svis.;
160. Belinfante, D-ro F. J., West Lafayette;
161. Blackstone, S-ro R., Orlando, Usono;
162. Fox, S-ro J. S., Los Angeles, Usono;
163. Jungton, F-ino E. M., Pewaukee, Usono;
164. Milsted, S-ro H. B., Zanesville, Ohio;
165. Nace, S-ro Paul E., Hyattsville, Usono;
166. Simon, S-ro Werner, Memphis, Tennessee;
167. Simpson, S-ro W. P., Harrisburg, Pa.;
168. Solzbacher, D-ro W., Washington 16 D.C.
169. Boffejon, S-ro H., Brasschaat, Belgujo;
170. Kestens, F-ino M., Bruxelles 8, Belgujo;
171. Aitchison, S-ro G. R., Northampton, Brit.
172. Atkinson, S-ro W., Worcester Pk., Brit.;
173. Berry, F-ino E., Haslingdon, Britujo;
174. Crabtree, S-ro E. P., Annesley, Britujo;
175. Eldon, S-ro H. B., Southport, Britujo;
176. Goulding, S-ino E., Blackburn, Britujo;
177. Pilling, S-ino F. K., Blackpool, Britujo;
178. Relf, S-ro E. F., Addlestone, Britujo;
179. Seddon, S-ino R., Southport, Britujo;
180. Larsen, S-ro L., Odense, Danlando;
181. Møller, S-ro Poul, Viborg, Danlando;
182. Mikkola, S-ro J., Oulunkylä, Finnlando;
183. Beau, S-ro J., Marseille, Francujo;
184. Bideau, S-ro A., Dijon, Francujo;
185. Delahaye, S-ro I., Petitville, Francujo;
186. Larglantier, S-ro G., Paris 16, Francujo;
187. Lemonnier, F-ino G., Asnières, Francujo;
188. Maillard, D-ro G., Bourg-la-Reine, Fr.;
189. Marly, S-ro P., Bordeaux, Francujo;
190. Moreau, S-ro M., Libourne, Francujo;
191. Trésorier, S-ino J., Besançon, Francujo;
192. Yelland, S-ro E. E., Aspremont, Francujo;
193. Gernsbacher, S-ino M., Köln, Germanujo;
194. Grundhoff, S-ro J., Wuppertal, Germanujo;
195. Knauss, S-ro W., Neu-Ulm, Germanujo;
196. Kraft, S-ro T., Schwäbisch Gmünd,
197. Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo;
198. Urban, S-ro W., Burtenbach, Germanujo;
199. Volk, S-ro Friedrich, Würzburg, Germ.;
200. Castelltort, S-ro J., Igualada, Hispanujo;
201. Perarnau, S-ro J., Tarrasa, Hispanujo;
202. Tonico, S-ro Tomás, Granollers, Hisp.;
203. Minnaia, S-ro L., Roma, Italujo;
204. Archell, S-ro R. S., Ville Lasalle, Kan.;
205. Cins, S-ro S. I., Riga, Sovetunio;
206. Agge, S-ro Karl, Stockholm, Svedujo;
207. Ahlin, S-ro E. V., Skövde, Svedujo;
208. Ahlström, F-ino M., Göteborg, Svedujo;
209. Aimen, S-ro P., Hällefors, Svedujo;
210. Andreasson, S-ro Bertil, Tomelilla, Sv.;
211. Asplund, F-ino N., Eskilstuna, Svedujo;
212. Bengtsson, S-ro Karl, Krylbo, Svedujo;
213. Ekbohm, F-ino Anna, Boden, Svedujo;
214. Emson, S-ino R., Borås, Svedujo;

- | | |
|--|---|
| 215. Eriksson, S-ro Axel, Ramvik, Svedujo; | 230. Persson, S-ro Olle, Trelleborg, Svedujo; |
| 216. Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo; | 231. Pettersson, S-ro Folke, Solna, Svedujo; |
| 217. Fingalsson, S-ro B., Gisebo, Svedujo; | 232. Sedendahl, S-ro W., Uppsala, Svedujo; |
| 218. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, Svedujo; | 233. Sjöberg, S-ro H., Gnosjö, Svedujo; |
| 219. Helm, S-ro Axel, Hästveda, Svedujo; | 234. Snarberg, S-ro Jack, Stockholm Ö.; |
| 220. Jensie, S-ino M., Jönköping, Svedujo; | 235. Stenström, S-ro John, Jönköping, Sved.; |
| 221. Johansson, S-ro Erik, Göteborg, Svedujo; | 236. Svärd, S-ino Rut, Borås, Svedujo; |
| 222. Lindberg, S-ro Erik, Borås, Svedujo; | 237. Syrjämäki, S-ro Matti, Borås, Svedujo; |
| 223. Linder, S-ro Karl H., Stockholm Ö.; | 238. Curtenaz, S-ro E., Zürich 55, Svisujo; |
| 224. Mellberg, F-ino G., Varberg, Svedujo; | 239. Zoller, S-ro F., Güttingen, Svisujo; |
| 225. Näslund, F-ino E., Uppsala, Svedujo; | 240. Gerber, S-ro W., Twin Falls, Usono; |
| 226. Olsson, F-ino Agda, Göteborg, Svedujo; | 241. Neri, S-ro R. R., Stafford Springs, Usono; |
| 227. Olsson, S-ro Einar, Svängsta, Svedujo; | 242. Parsons, S-ino L. M., San Mateo, Calif.; |
| 228. Olsson, S-ro Olle, Lund, Svedujo; | 243. Pauling, S-ro W., San Salvador, Bahamoj; |
| 229. Palmgren, S-ro Rune, Vällingby, Svedujo; | 244. Young, S-ro Alton, Twin Falls, Usono. |

daŭrigo
sur p. 78

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu "Esperanto" 1963, p. 117 (junio). Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.45m. (9540 kcs), 31.01m. (9675 kcs), P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	23.30-23.55	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 41.35m. (7255 kcs). P.
Lundo	6.15-6.30	Gdansk, 230m. (1304 kcs), I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk, Pollando.
	12.10-12.20	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 13.94m. (21520 kcs.) (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	15.00-15.15	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs). 293m. (1025 kcs). 25.45. (11785). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 30.90m. (9710 kcs). P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	11.00-11.30	Pjongjang, 360m. (820 kcs), 286m. (1050 kcs), 278m. (1080 kcs), 48.00m. (6250 kcs), I.P. Centra Radio-Komitato, Pjongjang, Norda Koreujo.
	12.10-12.20	Bern. Kiel lunde, (S-ro C. Gacond).
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11.950 kcs), 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	18.45-19.00	Resende, 1961m. (153 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
Ĵaŭdo	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato.)
	20.30-20.45	Volta Redonda, 1560m. (192 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.15-21.25	Bern 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 31.07m. (9655 kcs), 25.61m. (11715 kcs). P. (D-ro A. Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Radio Zagreb).
	23.00-23.10	Valencia, 193m. (1554 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Vendredo	10.00-11.10	Praha, 49m., 41m., 31m. I (Ripeto de la ĵaŭda rubriko la morgaŭan vendredon; dekminuta parolado dum germanlingva programo).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.0	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs), 30.75m. (9760 kcs). I.K. Radio Nacional TGW, Guatemala Cd., Mezameriko.
	19.00-19.15	Teresina, 259m. (1160 kcs), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde. (S-ro C. Gacond).
		Radio Roma. Vidu detalan programon en la marta numero.



DONACIOJ GENERALA KASO

Leŭt. F. E. Swift, Nov-Zelando: 2,12 gld.
S-ro O. Bond Collier, Usono: 7,20 gld.
S-ro H. Ledeen, Pasadena, Usono: 4,50 gld.

FONDAJO CANUTO

Leeds Esperanto-Societo, Britujo: 1 MA
S-ro Yrjö Rautio, Finnlando: 2 MA
Anonimulino, Finnlando: 1 MA
S-ro M. Oksala, Toijala, Finnlando: 1 MA
S-ro E. Lehtonen, Jyväskylä, Finnlando: 1 MJ

FONDAJO JUNULARA GAZETO

Anonima: 5,— gld.
S-ro T. Kehlet, Danlando: 27,80 gld.
F-ino Sirkku Koivu, Finnlando: 3,60 gld.
S-ro T. C. L. Bluett, Britujo: 5,— gld.
D-ro R. H. Osborne, Britujo: 10,— gld.
Usono: F-ino Collier 2,75; Ges. Harmon 9,—;
H. E. Dillinger 18,—; K. S. Friedman 3,50;
J. L. Spence 10,75; A. Hutcheon 7,20; Peninsula
Esperanto-Ligo 18,—; H. K. VerPloeg 7,20;
A. Atkalns 5,65; R. C. Marble 90,— gld.
Entute: 825,17 gld.

DONACO INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ino Carolyn G. Lanzzone, San Carlos: 7,56 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro
ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

stato je la 29-a de februaro
Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Britujo	6691	4534	67,76
2.	Francujo	7752	5035	64,95
3.	Nederlando	5975	3420	57,24
4.	Finnlando	3160	1795	56,80
5.	Svedujo	7180	3970	55,29
6.	Svislando	2459	1310	53,27
7.	Brazilo	3694	1903	51,52
8.	Usono	4526	2315	51,15
9.	Belgujo	2055	1005	48,91
10.	Italujo	4210	2040	48,46
11.	Hispanujo	2660	1280	48,07
12.	Danlando	3099	1445	46,63
13.	Japanujo	3690	1715	46,48
14.	Germanujo	7141	3175	44,46
15.	Norvegujo	1755	675	38,46
16.	Jugoslavio	5375	1120	20,84

Konkurso II

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Aŭstralio	1475	1048	71,05
2.	Portugalujo	485	305	68,08
3.	Kanado	842	440	52,26
4.	Nov-Zelando	1481	750	50,64
5.	Aŭstrujo	1430	720	50,35
6.	Madagaskaro	250	120	48,—
7.	Islando	250	105	42,—
8.	Israelo	460	160	34,78
9.	Urugvajo	250	75	30,—
10.	Sudafriko	250	60	24,—
11.	Argentino	810	120	14,81

ANONCETOJ

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Literatura Mondo Kompletaj jarkolektoj kaj opaj numeroj riceveblaj ĉe Ladislao Somlai, Budapest V, Bajcsy Zs. ut 40.

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Logiko. Tiu granda libro estas unu el la bazaj verkoj de Martinus. Ĝi enhavas analizojn de la homa vivo kun ĝiaj suferoj kaj malfacilaĵoj; kaj logikaj argumentoj kaj akraj konkludoj bazitaj sur objektivaj faktoj donas surprize klaran bildon de la rezultoj de la homa evoluo. (200 paĝoj. Formato 18 × 25 cm. Fortika kaj bela blanka kovrilo kun ora surpreso. Prezo 22,00 d. kr.) Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Eksciinte pri la terura tertremo trafinta mian urbon Skopje pasintan julion, la delegito de UEA, samideano Ralph A. Lewin, University of California, La Jolla, Calif. Usono interesiĝis pri mi kaj tuj sendis al mia malfeliĉa familo abundan helpon. Al samideano Ralph A. Lewin mi esprimas profundan dankon. Stefan Arsov, dipl. ekonomiisto, Skopje, Jugoslavio.

37 komencantoj 25 — 40-jaraj dez. kor. pĉt. S-ino Irena Grabowicz, Varsovio 86, ul. Stołeczna 8 m 69, Pollando.

Ĉiu eksterlandano kiu sendos al mi 50-300 diversajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos de mi la saman kvanton de mia lando. Günter Killmer, Erntegrund 27, 56 Wuppertal-Vohwinkel, Okcident-Germanio.

Redaktoro de "Esperanto" serĉas libreton "Nalo kaj Damayanti", kiun elsanskritigis Antoni Lange, eld. Günther, Varsovio 1912. Kiu vendos?

Kiu sendos 2 insignojn ricevos bele afrankitan koloran B.K. Ankaŭ aranĝos B.K.-vesperon en julio. Respondo garantiita. Peter Köller, Reálni 6, Ostrava 1, Ĉeĥoslovakio.

Por praktiki Esperanton kun gestudentoj deziras korespondadi studentino Rosa Maria de Canha, Ponta do Sol, Madeira Portugalujo.

Serioza filatelisto interŝanĝas neuzitajn p.m.: florojn, kaj aliajn motivajn seriojn. Demeter Dénes, Budapest XXI, Határ-U.85, Hungarujo

Korespondi deziras ĉiulanden, kolektante poŝtmarkojn, 15-jara studentino de knabinmezlernejo, Gisela Mertin, 8151 Dietramszell, Germ.

Deziras eŭropajn komemorativajn pm kaj sendas italajn kaj svedajn pm. Alessandro Jacobitti, Viale Mariacristina Savoia 18, Napoli, Italujo.

ĉu
la
doku
mentoj
de
CED
aperu
ankaŭ
en
Espe
ranto ?
re
legu
sur
paĝo
50

Liona Esperanto-Societo organizos ekspozicion de humoraj desegnaĵoj "Sen Vortoj" en oktobro 1964. Gesamideanoj el ĉiuj landoj estas petataj eltondi senvortajn humorajn desegnaĵojn el naciaj gazetoj kaj sendi ilin tuj al S-ano S. Budimir, 290 Boulevard Pinel, Lion 8°, Francujo. Antaŭan dankon. Anonco represebla.

Bonvenon al Svedlando! Surmonte en belega regiono okazos Cseh-kursoj por komencantoj kaj progresintoj somere 1964 (4—17 julio). Instruos: Dupuis resp. Szilágyi. Sekvos (17—25 Julio) tutsemajna Universala Studrondo sub rubriko: La situacio de la homo en la nova mondbildo. Prelegoj — interparoloj — ekskursoj ktp. en amikeca atmosfero. Petu prospekton ĉe FERIA HEJMO LA KOSMO, adreso: Varnhem, Svedlando.

Mi deziras korespondi kun esperantistoj el Nederlando, Japanujo, Bulgarujo, Hungarujo, Usono, Kanado, Okc. Germanujo kaj Svedujo, plej volonte de pola deveno. Mi volas ilin viziti kaj inviti al Pollando. L. Zgirska, kuracisto, Jastrowie (Koszalin) skr. pczt. 12, Pollando.

Nova adreso: Sevilla (Hispanio) — S-ro Carlos Martínez-Avenida de Ramón y Cajal (Nervión) Coopa. Sevillana, Bloque Diez, Casa no. 1, pral, derecha, Buzón no. 4 = Deziras nur interŝanĝi I.P. kolorigitajn, prefere, bildojn de urbvidindaĵoj.

Sendu ĉiajn Esperantaĵojn por okazigi Ekspozicion. Ni bezonas vian helpon. Nova Esperanto-Grupo Vilanova y Geltrú, Fomento Vilanova y Geltrú, Str. Sta Madrona 1, Vilanova y Geltrú (Barcelona), Hispanujo.

Farmaciistoj kaj gestudentoj de Farmacia Fakultato deziras korespondi tutmonde kun kolegoj pri Farmaciaj temoj. Internacia Centro-Esperantistaj Farmaciistoj, str. Lucullo 6, Roma, Italio.

Gekomencantoj (20—50 jaraĵoj) volas korespondi kun franca, greka, japana, norvega, sveda kaj hungara gesamideanoj pri ties lando kaj homoj. Adreso: Wieland Nordwall, 309 Verden/Aller, Am Meldauer Berg 199, Okc. Germanujo.

D. Soleo por ŝpari monon ne anoncetos ĝis Hago!

Originalaj verkoj de

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

LA GRANDA AVENTURO

de Ferenc Szilágyi

en stilo flua, varia kaj eleganta
broŝ. gld. 4,75; bind. gld. 6,—

VIVO VOKAS

de Stellan Engholm

en stilo simpla kaj neafekta
broŝ, gld. 4,75; bind. gld. 6,—

SIPESTRO RAKONTAS

de kapitano F. T. Lundquist

pri travivaĵoj sur la sep maroj
broŝ. gld. 3,75; bind. gld. 6,—

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

Helsingör

invitas vin pasigi ferian semajnon en La internacia Altlernejo 19.—26. julio inter samideanoj el multaj diversaj landoj. Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

Abyhøj, Danlando

PETU PROSPEKTON PRI



ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND

KONTAKTO

SEN PAGE

vi ricevos la junularan revuon

KONTAKTO

dum 1964, se vi pagis kiel MA kaj naskiĝis en 1939 aŭ poste. Tuj informu nin pri la dato de via naskiĝo!

KONTAKTO

BIBLIA REVUO

Internacia Revuo en Esperanto pri bibliaj studoj, celas fakulojn, pastrojn, instruistojn, teologiajn studentojn, interesatojn pri religio, arkeologio, historio, kaj ĉiun kleran leganton de la Biblio. Kvaronjara gazeto, kajeroj po 80 paĝoj.

En la unuaj numeroj:

La Pentraĵoj en la Sinagogo ĉe Dura, de Edward C. Hobbs

La Tradici-Historia Metodo de Interpretado, de Helmer Ringgren

Sklaveco en la Antikva Proks. Oriento, de E. J. Görlich

La Mesio-Predikado de Johano la Baptisto, de Stefan Maul

Carl Jung kaj la Biblio, de Donald Broadribb

Jarabono: 60 steloj (\$ 4.50) antaŭ majo, 65 steloj (\$ 5.00) post majo. Mendu de: Dr. E. J. Görlich, Messenhausergasse 4/2, Wien III, Aŭstrujo (poŝtĉekkonto: Zürich VIII, 50473); Olavi Peltonen, 404/5, Tikkakoski, Suomio; Violet Broadribb, 3512 S.E. 9th Ave., Portland, Oregon, 97202, Usono; Donald Broadribb, Dept. of Semitic Studies, University of Melbourne, Parkville, N. 2., Victoria, Aŭstralio.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (53,3 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Germanlingvanoj !

Se vi serĉas taŭgan lernolibron
por nova kurso aŭ por
individua instruado
mendu

ESPERANTO-LEHRGANG

de Kieseritzky kaj Lindén
elementa lernilo
143-paĝa


Ĉiu ĉapitro donas legaĵojn,
gramatikajn klarigojn kaj ripetaĵojn.

**Favora prezo: nur 1 g.m. aŭ 0,90 gld.
plus afranko 10 %**

Mendu ĉe la Centra Oficejo

LA NAŬZO

bind.
14,10 gld.
56,40 st.



broŝ.
11,70 gld.
46,80 st.

222 p.
15 × 21

222 p.
15 × 21

la obseda romano de

Jean-Paul Sartre

intimaj pensoj de neordinara menso
la unua okcidenta verko en la serio

ORIENTO-OKCIDENTO

Tradukis Roger Bernard. Eldonis UEA.

SHAKESPEARE

OTELLO

LA MAŬRO DE VENECIO

Tradukita de

Reto Rossetti

HAMLETO

PRINCO DE DANUJO

Tradukita de

L. N. M. Newell

La unua antaŭ ne longe aperinta kaj la dua nun presata estas la
titoloj per kiuj la eldonoj sub la emblemo

STAFETO

kunhelpas honori en la Internacia Lingvo la 400an datrevenon de la granda dramverkisto


Du admirindaj tradukoj laŭ du malsamaj tradukprincipoj

Du artaj prilaboroj sur malsamaj fasadoj de la sama monumento !

Du diversaj stiloj honore al *Shakespeare*, al *Zamenhof* kaj al nia artlingvo !

La librojn liveras la eldonisto *J. Régulo, UEA* kaj ĉiuj gravaj libro-servoj de Esperantujo

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON



Supre Sur la Ondoĵ

"Libereco de la maroj".....

..... Libereco tiom valora, ke sangaj militoj estis necesaj por defendi ĝin; libereco sanktigita en "La Atlantika Ĉarto". Ĉar, sen transoceana komerco, multaj grandaj nacioj reduktiĝus al stato de malriĉeco kaj malsato. Sed, traktatoj kaj ĉartoj ne sufiĉas por sekurigi la ŝipvojojn transmondajn por tiuj, kiuj navigas ilin. Nuntempe la ŝipoj utiligas daŭre pliampleksiĝantan, modernan instrumentaron por piloti ilin rapide al la celo kaj por sendanĝera enhaveniĝo.

Multaj el tiuj instrumentoj naskiĝis en la Laboratorioj de Scienca Esplorado ĉe Philips. Forlasante la havenon, la ŝipo estas gvidata de

piloto kiu uzas la moveblan komunikilon de Philips. Surmare, la telekomunika ekipaĵo de Philips certigas konstantan kontakton kun la bordo - kaj kun aliaj ŝipoj. Kaj kiam ĝi reenhaveniĝas, la havena radar-sistemo de Philips kondukas ĝin glate ĝis la alligejo.... tra ĉia vetero.

Devenante de unu el la plej famaj marveturantaj nacioj en historio, la organizaĵo Philips sentas profundan kontentiĝon povante servi al ĉiuj kiuj surŝipe navigas la marojn.

PHILIPS

Elektronika Ekipaĵo